


人民中國報道

El Popolo Cinese

Jul. 1952



La Elektitaj Verkoj de Maŭ Ze-tung

Revuo de Volumo II

La dua volumo de la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Ze-tung* enhavas 41 verkojn skribitajn de Kamarado Maŭ Ze-tung inter la eksplodo de la Kontraŭ-japana Milito en julio, 1937 kaj la periodo kiam la alta tajdo de la dua kontraŭ-komunista kampanjo fare de Ĉiang Kaj-ŝek estis repuŝita en majo, 1941. Inter la gravaj verkoj kolektitaj tie ĉi estas: *La Principoj, Metodoj kaj Perspektivoj de la Kontraŭstarado al Japana Invado, Luktu por Mobilizi Ĉiujn Fortojn por Venko en la Rezistmilito kontraŭ Japana Agreso, Kontraŭ Liberalismo, La Situacio kaj Niaj Taskoj en la Rezistmilito kontraŭ Japana Agreso post la Perdo de Ŝanhajo kaj Tajjuan, Strategiaj Problemoj de Kontraŭ-japana Gerila Milito, Pri Longdaŭra Milito, La Rolo de la Ĉina Komunista Partio en la Milito de Nacia Liberigo, La Problemo de Sendependeco kaj Aŭtonomio Interne de la Unueca Fronto, Problemoj pri Milito kaj Strategio, La Direkto*



Busto de Maŭ Ze-tung
Skulptita de Ĉang Sun-haŭ

por la Gejunula Movado, Komentario pri la Nova Internacia Situacio Farita al la Korespondanto de la "Ŝinhua tagjurnalo" dum Intervjuo, La Intereso de Sovetunio Identas kun Tiuj de la Homaro, Antaŭparolo al "La Komunisto", La Ĉina Revolucio kaj la Ĉina Komunista Partio, Stalin—Amiko de la Ĉina Popolo, Pri Nova Demokratio, Problemoj pri la Politika Potenco en la Kontraŭ-japanaj Bazlokoj, Taktikaj Problemoj de la Kontraŭ-japana Unueca Fronto en la Nuna Tempo, Disvolvigo Libere la Fortojn por Rezisti Japanion kaj Repuŝu la Atakojn de la Kontraŭ-komunistaj "Obstinuloj", Pri Politiko, Konkludoj Eltiritaj el la Repuŝado de la Alta Tajdo de la Dua Kontraŭ-komunista Kampanjo, kaj Pri Kontraŭdiroj.

La Principoj, Metodoj kaj Perspektivoj de la Kontraŭstarado al Japana Invado kaj Luktu por Mobilizi Ĉiujn Fortojn por Venko en la Rezistmilito kontraŭ Japana Agreso estis skribitaj de Kamarado Maŭ Ze-tung en la komenco de la Kontraŭ-japana Milito. En tiuj ĉi du artikoloj Kamarado Maŭ Ze-tung analizas du fundamente malsamajn politikojn rilate al la problemo de Kontraŭ-japana Milito. Unu estas la politiko de la proletaro kaj la popolamasoj reprezentataj de la Komunista Partio kaj la alia estas la politiko de la grandaj bienuloj kaj grandaj burĝoj reprezentataj de Kuomintang. La lukto inter tiuj du politikoj de la Komunista Partio kaj Kuomintang, elmontrita de Kamarado Maŭ Ze-tung tuj post la komenco de la milito, daŭris dum la tuta ok-jara Kontraŭ-japana Milito.

En la raporto pri *La Situacio kaj Niaj Taskoj en la Rezistmilito kontraŭ Japana Agreso post la Perdo de*

Ŝanhajo kaj Tajjuan, Kamarado Maŭ Ze-tung emfazas la principan diferencon inter la propono de la Komunista Partio rilate la Kontraŭ-japanan Militon kaj tiu de Kuomintang, t.e. la Komunista Partio "aprobis ĉiuf flankan nacia revolucion militon per la ĝenerala mobilizado de la tutlanda popolo" dum Kuomintang insistis pri "parta rezistmilito fare de la registaro sola sen la partopreno de la popolamasoj." Li ankaŭ montras ke la Kuomintang "parta rezistmilito neeviteble kondukos al malvenko." Kamarado Maŭ Ze-tung klarigas: "Depost la Lukoĉiaŭ-a Akcidento la ĉefa danĝera tendeco en la Partio jam ŝanĝiĝis de la 'maldeks'ra' pordoferma sektanismo al la dekstra oportunismo aŭ kapitulaciismo." Daŭrigante li emfazas ke neniuj membroj de la Komunista Partio forgesu la amaran lecionon de la kapitulaciismo de Ĉen Tu-siu en 1927. Li proponas la principojn de sendependeco kaj aŭtono-

mio interne de la unueca fronto kaj asertas ke en la unueca fronto la maldekstra grupo devas esti pligrandigata kaj plifirmigata, la meza grupo devas esti gajnata kaj la dekstra grupo devas esti izolata.

Strategiaj Problemoj de Kontraŭ-japana Gerila Milito kaj Pri Longdaŭra Milito estas la du verkoj de Kamarado Maŭ Ze-tung kie, en la komenca stadio de Kontraŭ-japana Milito, li faris sciencan analizon pri la problemoj de la milito kaj prezentis sian brilan strategian planon disvolvi popolan militon. Komparante la fortojn je la dispono de Ĉinio kaj Japanio, taksante la fortojn de diversaj klasoj en la lando kaj konsiderante probablajn ŝanĝojn en la rilato de tiuj diversaj fortoj, Kamarado Maŭ Ze-tung kontraŭstaris ambaŭ "teorion de subjugado" (de Ĉinio) kaj "teorion de rapida venko" (por Ĉinio). Li antaŭvidis ke la Kontraŭ-japana Milito estos neeviteble plilongigata kaj la venko estos gajnata nur post paso tra la tri stadioj de defendado, ekvilibro kaj kontraŭ-ofensivo. Surbaze de tiuj faktoj Kamarado Maŭ Ze-tung, kontraste al la dekstraj oportunistoj, planis kiel la avangardo de la proletaro organizos la popolajn fortojn, kiel ĝi antaŭeniros de la strategia periodo kiam la popolo faras gerilan militon per sendependaj kaj aŭtonomaj gerilunuoj al alia strategia periodo kiam la popolo faros regulan militon kontraŭ Japanio kaj poste luktos por disvolvi la militon kontraŭ Japanio en popola venko.

La Rolo de la Ĉina Komunista Partio en la Milito de Nacia Liberigo klarigas kiel la Komunistoj devas surŝultrigi la grandiozan historian taskon gvidi efike la militon de nacia liberigo. Surbaze de la praktikaj

spertoj de la ĉina revolucio, Kamarado Maŭ Ze-tung priskribas konkrete kaj koncize la diversajn aspektojn de la alta proletara seriozeco de la Partio kaj ĝia korekta organiza linio starigi intiman kontakton kun la popolamasoj. En tiu ĉi grava raporto la parto kiu pritraktas studadon faras profundan klarigon ke la Partio devas antaŭ ĉio plialtigi la nivelon de marksist-leninista konscio de ĉiuj anoj por ke ili povu surŝultrigi siajn grandajn historiajn taskojn. La forta alvoko kiun Kamarado Maŭ Ze-tung faris en tiu ĉi verko koncerne la adaptadon de marksismo-leninismo al ĉinaj kondiĉoj instigis grandegan intereson pri la studo de marksismo-leninismo interne de la Partio.

La Problemo de Sendependeco kaj Aŭtonomio Interne de la Unueca Fronto kaj Problemoj pri Milito kaj Strategio estas du interrilataj problemoj de la politika linio de la Partio en tiu tempo. En tiuj ĉi du artikoloj Kamarado Maŭ Ze-tung kritikis malkorektan cedemon koncerne al la problemoj de la unueca fronto. Li kritikis la malkorektan ideon de timo pri plivastigado de la liberigitaj regionoj kaj la popola milito en la regionoj okupitaj de Japanio kaj espero pri venko super la japanaj banditoj fare de Kuomintangaj trupoj kaj konfido de la sorto de la popolo al la laŭleĝa kampanjo sub la reakcia regado de Ĉiang Kaj-ŝek. La du artikoloj prezentas la fundamentajn konkludojn faritajn de Kamarado Maŭ Ze-tung rilate la disputon pri politikaj linioj interne de la Partio en la komenca stadio de la Kontraŭ-japana Milito. Ili estis signifoplenaj en la unuigo de la paŝoj de la Partia laboro.

En Komentario pri la Nova Internacia Situacio Farita al la Korespondanto de la "Ŝinhua-Tagjurnalo" dum Intervjuo penetrema analizo estas farita pri la kompleksa kaj ŝanĝiĝanta internacia situacio tiutempa. Tio forigis certan ideologian konfuzon kiu ekzistis en kaj ekster la Partio kaj elmontris la politikon kiun la Partio devis adopti en tiu tempo.

Analizante kelkajn internaciajn aferojn kiuj interesis ĉiujn en tiu periodo, *La Intereso de Sovetunio Identas kun Tiuj de la Homaro* klarigas problemon kiu koncernas la destinon de la popoloj de ĉiuj landoj. Por la ĉina popolo tiu estas ekstreme grava verko pri la alianco de la popoloj de la du grandaj landoj—Ĉinio kaj Sovetunio.

En Antaŭparolo al "La Komunisto" Kamarado Maŭ Ze-tung elmontras la tri fundamentajn problemojn por la Partio en ĉina revolucio; la unueca fronto, la armita lukto kaj la konstruado de la Partio. Kamarado Maŭ Ze-tung skribas: "Korekta kompreno de tiuj ĉi tri problemoj kaj ilia interrilato egalas al dono de korekta gvidado al la tuta ĉina revolucio." Kamarado Maŭ Ze-tung faras profundan historian klarigon pri la problemoj de ambaŭ unuigo kaj lukto rilate al la burĝaro, pri la problemoj ke "sen armita lukto ne troviĝos en Ĉinio loko por la proletaro, aŭ la popolo, aŭ la Komunista Partio kaj la revolucio ne atingos venkon" kaj pri la problemoj de la kunigo de marksismo-leninismo kun la praktiko de ĉina revolucio.

En la pamfleto *La Ĉina Revolucio kaj la Ĉina Komunista Partio*, la fundamentaj problemoj de la ĉina revolucio estas klarigitaj en konciza, populara maniero.

Pri Nova Demokratio estas verko kun granda historia signifo. Surbaze de la analizo de la fundamentaj ŝanĝoj en la historiaj kondiĉoj internacia (la proletara socialista revolucio jam komenciĝis kaj gajnis venkon en Rusio) kaj nacia (la proletaro jam fariĝis la gvidanta forto de ĉina revolucio), kaj la novaj spertoj akumulitaj

dum dudek jaroj da ĉina revolucio, Kamarado Maŭ Ze-tung disvolvas Lenin-Stalinan teorion rilate al la revolucioj en koloniaj kaj duon-koloniaj landoj. Li faras distingon inter la du historiaj periodoj de ĉina revolucio—la malnova demokratio kaj la nova demokratio, kiuj apartenas al du malsamaj historiaj kategorioj. Li solvis la teoriajn problemojn de la novdemokratia nacia konstruado de Ĉinio kaj ĝiaj preparoj por antaŭeniro al socialismo. Li frakasis tiel la reakcian iluzion establi burĝan diktatorecon en Ĉinio. Tiu ĉi estas perfekte integra teoria verko pri ĉina revolucio surbaze de marksismo-leninismo. Ĝi ludis tre gravan rolon en la mobilizado kaj organizado de la ĉina popolo en la liberiga lukto kaj en la konstruo de nova Ĉinio kaj konsekvence aldonas fortegon al ĉina revolucio.

Superu la Danĝeron de Kapituliismo kaj Forte Luktu por Plibonigi la Situacion, Taktikaj Problemoj pri la Kontraŭjapana Unueca Fronto en la Nuna Tempo, Disvolu Libere la Fortojn por Rezisti Japanion kaj Repuŝu la Atakojn de la Kontraŭ-komunistaj "Obstinulaĉoj", Pri Politiko, kaj Konkludoj Eltiritaj el la Repuŝado de la Alta Tajdo de la Dua Kontraŭ-komunista Kampanjo estas verkoj skribitaj de Kamarado Maŭ Ze-tung en la tempo kiam li estis gvidanta la Partion plenumi akrajn, ripetigintajn, sinsekvajn luktojn kontraŭ la Kuomintangaj kapitulaciaj kaj kontraŭ-komunistaj politikoj dum la Kontraŭ-japana Milito. Tiuj ĉi verkoj plue klarigas kaj plikonkretigas la politikon de ambaŭ unuigo kaj lukto rilate al la problemoj de la unueca fronto. Ili helpis mobilizi la popolamasojn por repuŝi la Kuomintangan kontraŭ-komunistan kampanjon ĉe ĝia alta tajdo kaj korekti la erarojn de parto de la kamaradoj, kiu estis ankoraŭ sub la influo de kapitulaciismo kaj ne kuraĝis disvolvi libere la revoluciajn fortojn.

En *Problemoj pri la Politika Potenco en la Kontraŭ-japanaj Bazlokoj* Kamarado Maŭ Ze-tung asertas ke la politika potenco en la kontraŭ-japanaj bazlokoj devas esti en la manoj de tiuj kiuj subtenas samtempe la rezist-militon kaj demokration, t.e., ĝi devas esti demokrata diktatoreco praktikata kune de kelkaj revoluciaj klasoj super la perfiduloj kaj reakciuloj. Tia politika potenco de la revolucia unueca fronto en la kontraŭ-japanaj bazlokoj kiu estis gvidata de la Komunista Partio kaj kiun partoprenis la reprezentantoj de la popolamasoj ludis grandegan rolon tiutempe en la partia politiko disvolvi la progresemajn fortojn, gajni la mezajn fortojn kaj izoli la reakciajn fortojn.

La unua eldono de la *Elektitaj Verkoj de Maŭ Ze-tung* volumo II, enhavas alian filozofian traktaton de Kamarado Maŭ Ze-tung: *Pri Kontraŭdiroj*. En tiu ĉi elstara, militema marksism-leninisma verko bazita sur la riĉaj spertoj de ĉina revolucio, Kamarado Maŭ Ze-tung plue disvolvis la dialektikan materialismon de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin. Li profunde klarigas ĉiun aspekton de la leĝo de la unueco de maloj—la "kerno de dialektiko". Precipe li klarigas kaj emfazas la specialan naturon de kontraŭdiroj. Li severe kritikis la subjektivan, partan, supraĵan, malkorektan pensmanieron de la doktrinistoj kiuj "rifuzas fari penigan studon pri konkretaj aferoj" kaj "ne scias la diferencojn inter la diversaj kondiĉoj de revolucio kaj tial ne scias kiel solvi malsamajn kontraŭdirojn per malsamaj metodoj sed ĉiam kaj ĉie perforte akceptigas iun formulon kiun ili opinias neŝanĝebla." Tiu ĉi verko estas grava kontribuo de Kamarado Maŭ Ze-tung al la filozofia trezoro de marksismo-leninismo.

Krimo kaj Heroeco sur Koĵe-insulo

La insulo de morto—tiel ili nomas Koĵe, la kampadejo kie pli ol 170,000 koreaj kaj ĉinaj militkaptitoj estas batataj, torturataj kaj mortigataj de Usonaj trupoj.

La kaptitoj vivas en malpuregaj kondiĉoj en tendetoj ĉirkaŭataj de ringoj da pikildrato kaj fortikaĵetoj. Flamjetaj tankoj kaj kirasaŭtoj patrolas la regionon senĉese. En la nokto serĉlumoj esploras la ombrojn por movoj suspektindaj al la gardistoj kiuj pafas je la plej eta preteksto.

Vintre kaj somere, la kaptitoj estas pakitaj tiel multe kiel 50 aŭ 60 en unu tendeto. Depeŝo al la Usona *Christian Science Monitor* priskribante kondiĉojn en la kotbarakoj diris ke ili estas “iom tro plenaj, enloĝigante 300 aŭ pli.” Manĝoj konsistas el maldelikata greno aŭ faboj kaj akveca legomsupo. Sur tia malsatiga dieto la kaptitoj estas devigataj fari streĉan laboron, konstruante vojojn kaj portante militmaterialojn.

La atesto pravas konkludige ke la Usonaj generaloj malobservis ĉiujn leĝojn kaj decajn homajn sentojn en sia traktado de kaptitoj. Estas ignoritaj ambaŭ artikoloj 13 kaj 14 de la 1949a Ĝeneva konvencio rilate al la traktado de militkaptitoj, al kiu Usono estis subskribinto. Artikolo 13 diras: “Militkaptitoj devas ĉiam esti humane traktataj.....Precipe, estas malpermesate subigi iun ajn militkaptiton al korpa kripligo aŭ iu ajn medicina aŭ scienca eksperimento kiu ne estas pravigita de la medicina denta aŭ hospitala traktado de la kaptito koncernata kaj efektivigita en lia intereso.” Artikolo 14 diras ke “militkaptitoj estas rajtigataj en ĉiuj cirkonstancoj al respekto por ilia persono kaj honoro.”

Uzitaj por Bakteriaj Eksperimentoj

Tamen, la kaptitoj estas uzitaj de la Usonaj generaloj por atombombaj kaj bakteriaj eksperimentoj. Pli ol 1,000 koreaj kaj Vietnamaj kaptitoj estas ŝipportitaj al nekonata destino por eksperimentoj en atomaj provoj. Bakteriaj armiloj ankaŭ estas provitaj sur la kaptitoj. Je la 18-a de majo lastjare *Associated Press* malkaŝis ke Usona Infanteria Surteriga Ŝipo n-ro 1091 estis uzata kiel flosanta laboratorio por eksperimento sur kaptitoj.

Artikolo 13 plue kondiĉas ke “Militkaptitoj devas ĉiam esti protektataj precipe kontraŭ agoj de perforto aŭ minactimigo....kaj kontraŭ insultoj kaj publika scivolemo.” Sed kiel la gardistoj de la nunaj Buchenwald-oj kaj Majdanek-oj interpretis ĉi tiun artikolon? Korespondanto de *United Press* Peter Gruening raportis je la 21a de januaro ke “malkaŝema komunisto en la oficiraj barakoj estis ŝnurpendigita je la dikfingroj kaj batata ĝis senkonscio.” La kaptitoj estas traktataj laŭ la kapricaj humoroj de la gardistoj. Citante novaĵejajn raportojn la *Manchester Guardian* diris je la 17 de marto pri la mortigo je la 13a de marto sur Koĵe-insulo ke la sangoverŝo estis la rezulto de la “kolerema temperamento” de iu gardisto. Kiel ĉiam, nenio estis farita por puni ĉi tiun “kolereman” gardiston. Laŭ Tan Kuang-ĉing, Usona agento kaptita de la ĉinaj volontuloj, militkaptito nomata Li de la 20a pelotono, 1-a bataliono en tendeto n-ro 72 estis ŝnurpendigita kaj skurĝata pro suspekto ke li estis organizanta komunistan grupon.

Kiam li senkonsciiĝis, li estis revivigita per malvarma akvo, kaj denove batata.

“Mortigoj? Multe da ili....”

La Usonaj gardistoj tiel ĝisfunde trempiĝis en krueleco, ke multaj el ili parolas ĝuste en la maniero de la Hitleraj kampadejaj *gauleiter*-oj. Prenu kiel ekzemplon Subkolonelon Joseph Moran, kampadejan administran oficiron. Kiam demandita de *United Press* pri la murdoj, li diris malvarmsange, “Mortigoj? Multe da ili....”

Artikolo 26 de la Ĝeneva Konvencio diras: “Kolektivaj disciplinaj rimedoj tuŝantaj nutraĵon estas malpermesataj.” Sed denove la Usonaj generaloj malobservis ĉi tiun definitivan malpermeson. Malsatigo estas unu el la armiloj uzataj kontraŭ kaptitoj “por ilin konformigi.” Je la 12a de majo estis ordonita amasa malsatigo al la enloĝantoj de la Pusan-hospitalo. La nura “krimo” je kiu la militkaptitoj en la hospitalo estis kulpaj estis striko por tiri atenton al ilia postulo por pli bona nutraĵo kaj deca traktado. Je la 4a de junio Usonaj novaĵoj raportis ke “sakoj da sablo” estis transdonitaj al kaptitoj en tendetoj n-roj 85 kaj 96 sur Koĵe-insulo anstataŭ iliaj manĝporcioj.

Konfesoj nur de Usonaj armeaj komunikajoj montras ke “dekoj estas mortigitaj kaj centoj vunditaj en la fantazia “kribr” ŝercrompo. La Murdoj okazis je la 17a de septembro lastjare, 18a de februaro ĉijare kaj je la 13a de marto, 10a de aprilo, 15a, 17a, 20a, 29a, 30a de majo, 2a, kaj 10a de junio en la tendetoj sur Koĵe-insulo kaj ankaŭ en la ĉefteraj tendetoj ĉe Pusan, Mansan kaj Jongĉon kiuj, oni pretendis, estis por “tiuj kiuj preferas memmortigon ol reveno al siaj landoj”. Ne estas mirinde ke la brita konservativa *Sunday Dispatch* priskribis la sangverŝon kiel “unu el la plej teruraj en historio.”

Sed la usonanoj ne enkalkulis la nekonkereblan spiriton kaj la altan patriotismon de la kaptitoj en siaj manoj. “Ni neniam timos, ni neniam cedos, ni neniam servos kiel kanonfuraĝo por la malamiko, ni neniam estos sklavoj de Usono. Ni....firme gardos niajn rajtojn, nian personecon kaj nian honoron,” la kaptitoj skribis en letero kaŝe portita de gerilanoj al la popolo de Koreio. Tiu nedetrubla heroa spirito donis al la koreaj kaj ĉinaj kaptitoj la volon defii la devigitajn tatuadon, peton skribitan en sango kaj ĉiujn ceterajn sadistajn metodojn uzatajn de la Usonaj gardistoj kaj iliaj Ĉiang Kaj-ŝek-aj kaj Singman Rhee-aj servistoj.

Neniu laŭdo povas esti tro alta por la homoj malantaŭ la pikildrato, kiuj defiis la flamjetajn tankojn kaj instrumentojn de torturo atentigante la mondon pri la labormetodoj de la novaj hitleranoj. Ilia sindono al siaj landoj estas firma. “Ĝuste kiel infanoj ne povas porti disigon de siaj patrinoj, tiel ni estas nedisigeblaj de nia patrio kaj nia pacama popolo,” skribis la koreaj armeanoj en la letero el kiu ni citis supre. Tio estas kial ĉiuj timigoj kaj provoj je “endoktrinigo” malsukcesis. Eĉ Usonaj fontoj tion konfesis. Skribante lastan septembron en la *Christian Science Monitor*, Frank Robertson raportis post vizito al la tendetoj ke la kaptitoj estas “firmaj sekvantoj” de siaj registaroj.

Ĉu estas mirinde ke la krueleco de la Usonaj gene-

raloj malsukcesis senkuraĝigi la kaptitojn? Ili malsukcesis kaj krome vekis la malamon de la mondo.

Pacamantoj en ĉiu parto de la mondo denuncis ĉi tiujn krimojn. "La Usonaj invadantoj jam superis la hitleranajn demonojn en siaj krueleĝaĵoj al sendefendaj homoj falintaj en iliajn manojn. Tia estas ilia 'civilizo', tia estas ilia 'humaneco', pri kio ili bruas...." estis la kolera komento de Akademiano Petrovski, Rektoro de Moskva Universitato. En Britio, publika opinio metas premon sur la Churchill-an registaron por protesti kontraŭ la agoj de la Usonaj generaloj. Eĉ la Londona *Times*, lojala apologiisto por Wall-strato devis komenti pri "ĥaosoj en la tendejoj de militkaptitoj kaj la mal-kompetenteco de kelkaj el la Usonaj oficiroj...." La Ministro de Ŝtato, Selwyn Lloyd, provis pacigi la britan publikan opinion, kiam li estis devigita konfesi lame en la Ĉambro de Deputitoj ke la situacio en la tendejoj estis "treege nekontenta". Naŭzita de la senĉesa mensogo pri la subjekto, eĉ la konservativa *Evening Standard* postulis sendistingan resendon de ĉiuj kaptitoj.

La Usonaj generaloj provis kontraŭi al la pliiĝantaj protestoj kontraŭ iliaj barbaraĵoj per novaj mensogoj kaj artifikoj. Post la malkaŝoj en la letero de la Komandanto de la Koje-insula Militkaptito-Kampadejo Brigada Generalo Colson (*sur p. 152*), kiu promesis respekti la ordinarajn normojn de dececo, pli da trupoj kaj flamjetaj tankoj estas senditaj sur la insulon sub la preteksto ke "la traktado de malamikaj kaptitoj estis tro malsevera en la pasinteco"! Trupoj estas ekzercitaj en pli bonaj metodoj de mortigo rekte en la fronto de la kaptitoj laŭ la nova "rigidiĝa" politiko de Boatner, la homo kiu anstataŭis Colson.

Venĝoj de Boatner

"Rimedo de venĝo kontraŭ militkaptitoj estas malpermesataj," diras Artikolo 13 la Ĝeneva Konvencio. Sed Boatner diris al siaj novaj gardistoj "frapi, genubati ili ĉe la ingveno." Sub tia incito ne estas mirinde ke iu Kaporalo Osborne el Nova Scotia alveninte al Koje tiel parolis al la *Associated Press*: "Ŝajnas ke riflopostajo sur la kapon ilin rektigus. Aŭ eble malpliigo de iliaj porcioj por kelkaj tagoj ilin rektigus." Tiaj estas la "altaj moralprincipoj" per kiuj dungitaj soldatoj kiel Osborne estas disciplinitaj de siaj mastroj.

La Usonaj sadistoj en uniformo, provante kaŝi sian respondecon por plujaj krimoj kiujn ili planas, ordonis britajn kaj Kanadajn trupojn al Koje en majo. Sed la Kanada popolo akre protestis kaj la Kanada Ministro de Eksterlandaj Aferoj Lester Pearson estis devigata sendi noton al la Usona registaro plendante ke la Kanada registaro ne estas konsultita je la ago.

Nek Usona opinio subtenas la sadisman sporton de la Usonaj *gauleiter*-oj. Kiel la Sovetia poeto Aleksej Surkov diris je la Moskva protest-kunveno, "La pacamaj nacioj neniam identigis la Usonajn imperiistojn kiuj estas la instigantoj de agreso kaj la organizantoj de nedireblaj kruelaĵoj en Koreio kun la liberama popolo de Usono kiu antaŭ nelonge batalis kontraŭ la faŝista plago ŝultro ĉe ŝultro kun la popoloj de Eŭropo kaj Azio." La Novjorka *Daily Worker*, esprimante la plej bonan tradicion de la Usona popolo, skribis: "La sen-

kompataj agoj de de Generalo Clark ne povas retiri la feran kurtenon sur la Koje-an skandalon; la mondo jam vidis la veron. La Usona popolo devas nun kompreni ke ĉi tiu panika milita kliko estas mokanta la interesojn kaj feliĉon de la Usona popolo."

La sangsoifaj komandantoj de Koje-aj gardistoj, tamen, ne satigas. Sole en tendejo n-ro 76, je la 10a de junio, pli ol 100 kaptitoj estis masakritaj en nova krueleĝaĵo "por restarigi ordon."


La malbonaj faroj en la tendejoj akordas nature kun la tuta modelo de konduto de la Usonaj trupoj en Koreio.

En la konkludo al sia raporto pri Usonaj krimoj en Koreio la leĝista internacia komisiono, kiu vizitis Koreion, por esplori militkrimojn de Usonaj fortoj diris: "La komisiono ne hezitas diri ke multaj el ĉi tiuj krimoj ne povis esti faritaj sen la plena scio kaj planado de la gvidantoj de la registaro de Usono kaj la supera komandejo de la Usonaj fortoj. Tial ĝi akuzas ĉi tiujn homojn kaj ĉiujn oficirojn komandantajn en la batalkampoj kiuj respondecas por ĉi tiuj krimoj kune kun ĉiuj individuaj soldatoj kiuj akceptis kaj efektivigis ordonojn kontraŭ internacia leĝo."

Ĉi tiu akuzo povas esti aplikata laŭvorte al la kazo de la Koje-insulo. Ĉiuj decaj personoj pleniĝas de "abomeno kaj konsterno pro la krueleĝaĵoj malkaŝitaj."

La Usonaj komandantoj respondecas por la masakroj sur la Koje-insulo malkaŝigas de siaj propraj diroj kaj sia propra gazetaro kiel militkrimuloj de la plej besta tipo. La sangaj okazaĵoj sur Koje-insulo ja estas malkaŝitaj. Sed kiu scias pri la dekoj da tendejoj kie nedireblaj krueleĝaĵoj estas farataj de aliaj Boatneroj sub vualo de sekreteco? Koje-insulo estas plua atesto de la sennombraj krueleĝaĵoj kaj abomenaĵoj inflikitaj sur la korean popolon de la Usonaj rivaloj de la Hitleraj kaj japanaj faŝistaj militkrimuloj. Por ĉi tiuj krimoj, la popoloj iutage postulos konton.

—L. P. C.



Du Fortaj Vangrapoj

de Ĉung Ling
Fang Ĉeng

Deklaracio de la Prepara Konferenco por la Packonferenco de Azia kaj Pacifika Regionoj

— la 6-an de junio, 1952, Pekino —

Ni, 47 delegitoj el 20 landoj de Azio, Aŭstralio, Sudameriko kaj Nordameriko, kunvenantaj en la Prepara Konferenco por Packonferenco de Azia kaj Pacifika Regionoj en Pekino de la 3-a ĝis la 6-a de junio 1952, urĝe alvokas al la popoloj de Azia kaj Pacifika regionoj ke ili unuigu, intensigu kaj disvolvu la movadon de pacdefendo.

Ni venis el diversaj landoj kaj parolas diversajn lingvojn. Kvankam ni havas diversajn politikajn vidpunktojn kaj religiajn kredojn, tamen ni reprezentas la komunan volon por paco de la popoloj de Azia kaj Pacifika regionoj. Ni profunde scias, ke la popoloj volas pacon sed abomenas militon; ke la popoloj kontraŭstaras agreson kaj ankaŭ neniel agresas aliajn; ke la popoloj postulas komercajn interrilatojn sed kontraŭstaras embargojn kaj blokadojn; ke la popoloj deziras interkomprenon kaj amikajn rilatojn sed ne volas esti obstrukcataj kaj barataj unu de la aliaj; kaj ke la popoloj bezonas prosperan vivon sed malamegas atombombojn, bakteriajn bombojn kaj ĥemiajn armilojn.

Tamen hodiaŭ, la bonaj aspiroj de la 1,600-milionaj popoloj de niaj Azia kaj Pacifika regionoj estas minacataj de la fantomo de milito kaj militaj preparoj.

En Koreio, la armistico sur justa kaj racia bazo, kiun urĝe postulas jam delonge ĉiuj pacamaj popoloj por fini la teruran katastrofon suferatan de la korea popolo kaj malfermi vojon por paca solvo de la problemoj en la Ekstrema Oriento, estas prokrastata kaj la uzado de kruelegaj hommasakraj armiloj dume minacas disvastigi la militon. Cetere, en aliaj lokoj de Azio, ekz. en Vietnamo kaj Malajo, la ekzistantaj militaj konfliktoj estas grave damaĝantaj la vivon kaj havaĵojn de la popoloj, kaj endanĝerigas la pacon en aliaj regionoj.

En Japanio, la altrudo de la aparta pactraktato kaj milita pakto, kiu kontraŭas la ekzistantajn internaciajn konvenciojn kaj la deziron de la japana popolo pri plena sendependeco kaj paca vivo sur bazo de vera pactraktato, kunportas al la japana popolo novajn suferojn. Kaj la reviviĝo de la agresiva japana militarismo kiu donis al la popoloj de Azia kaj Pacifika regionoj grandan katastrofon, nun tiujn popolojn denove minacas. Pro la rezido de eksterlandaj trupoj en la teritorio de Japanio, la japana popolo ankaŭ suferas danĝeron esti envolvata en novan militon.

Tra la regionoj de Azio kaj Pacifiko la suvereneco kaj teritoria integreco de multaj landoj estas endanĝerigitaj de agresaj paktoj kiuj surŝultrigis al la popoloj pezan ŝarĝon de militaj preparoj, rezidigis en iliaj landoj eksterlandajn trupojn, kaj forrabis de ili materialajn riĉaĵojn bezonatajn de la popoloj mem por sia propra bonvivo kaj ekonomia evoluo. Vastskalaj militaj preparoj kaj la ekzistantaj militaj konfliktoj en Vietnamo, Malajo kaj aliaj lokoj pli kaj pli subpremas la nacian liberigan movadon kaj la movadon por la defendo de nacia sendependeco, kiuj movadoj, ĉar ili celas fini nacian subpremon kaj sklavigon, multe kon-

tribuas por krei la bazon por paca kunekzistado de nacioj. En la preteksto de strategio, baroj pli kaj pli kreskas en la libera ekonomia kaj kultura interŝanĝado de nacioj, kiu estas tre necesa por la popola prospero kaj interkompreno.

Per unuanima agado por la paco, la popoloj de Azia kaj Pacifika regionoj ja povas ŝanĝi tiun situacion kaj fini la ekzistantajn kaj latentajn konfliktojn en Azio kaj rebati la minacon de milito. Se ili turnas sian komunan volon porpacan en unuigitan forton por pacdefendo, do ili povas gajni la kondiĉojn de paco por garantii sian plenan nacian sendependecon kaj fini la de militaj preparoj kunportitan mizeron kiun ili nun suferas; ili povas garantii la kunekzistadon de nacioj kun diversaj sistemoj politikaj kaj ekonomiaj sur bazo de egaleco inter nacioj kaj bazo de rajto de popoloj administri iliajn proprajn aferojn sen alies interveno; ili povas efektivigi la principojn kaj spiriton de la Ĉarto de Unuigitaj Nacioj kiu postulas pacan solvon de internaciaj malakordoj kaj atingon de interkonsento inter la Grandaj Potencoj; ili povas haltigi la malŝparan konkuron de militaj preparoj per internacia malarmado kaj malpermeso de atomaj, bakteriaj, ĥemiaj kaj aliaj armiloj amasbuĉaj; kaj ili povas frakasi ĉiajn barojn malhelpantajn la mondan komercon kaj kulturalan interŝanĝadon de la popoloj.

Ni ne povas sidante la pacon atendi. Ĝin devas porbatali la pacamaj popoloj unuiginte.

Kunligite kun la pacamaj popoloj de aliaj regionoj en la mondo, kiuj havas la samajn aspirojn, la popoloj de Azia kaj Pacifika regionoj certe povas gajni la venkon de paco super milito.

Por atingi tiun ĉi grandan celon, ni alvokas ĉiujn pacamajn homojn kaj sociajn organizojn en diversaj landoj en la Azia kaj Pacifika regionoj de kiaj ajn politikaj vidpunktoj, religiaj kredoj, nacioj kaj profesioj, pligranske unuigi sub la gvido de la preparaj komitatoj organizitaj aŭ organizotaj, diskuti pri la supremenciitaj problemoj, kaj elekti siajn reprezentantojn por la Packonferenco de Azia kaj Pacifika Regionoj, kiu okazos en Pekino en proksima estonteco, por trovi per intertraktado efikan programon por firmigi la pacon kaj sekurecon en tiuj ĉi regionoj.

Ni petas la pacamajn popolojn kaj sociajn organizojn ekster la Azia kaj Pacifika regionoj doni al ni varman subtenon kaj valorajn opiniojn.

En la entuziasma respondo al la iniciato kaj preparo de Packonferenco de Azia kaj Pacifika Regionoj la popoloj de tiuj regionoj jam manifestis sian grandan forton de unueco, kiu evidente ankoraŭ pligrandiĝas kaj plivastiĝas. La popoloj de Azia kaj Pacifika regionoj jam konscias sian forton, kaj tial ili havas firman konvinkon pri la venko de la pacdefenda movado.

Se paco povas esti garantiata en la Azia kaj Pacifika regionoj, tio multege kontribuos al la tutmonda paco.

(daŭrigo sur p. 150)

Ĉina-japana Komerckontrakto—Paŝo al Paco

Lung Men

La ĉina popolo gratulis kun varma aprobo la subskribon de komerckontrakto inter reprezentantoj de komercaj rondoj en Ĉinio kaj Japanio en Pekino je la 1-a de junio, 1952, markantan la unuan paŝon al rekomenco kaj disvolviĝo de normalaj kaj reciproke profitigaj komercaj rilatoj inter la popoloj de ĉi tiuj du najbaraj landoj en Azio.

La kontrakto estas la plej granda el tiuj kiuj ĝis nun rezultigis el la Internacia Ekonomia Konferenco okazinta en Moskvo de la 3a ĝis la 12a de majo. Ĝi kondiĉas por la interŝanĝo de diversaj varoj valorantaj 60 milionojn da sterlingaj funtoj.

La dokumenton subskribis por la ĉina flanko Nan Han-ĉen, prezidanto de la Ĉina Komitato por Akceli Internacian Komercon. Por la japana flanko, la kontrakton subskribis Tomi Kora, delegito al la lasttempa Internacia Ekonomia Konferenco en Moskvo, Kei Hoaŝi, delegito de la Japana Societo por Akceli Ĉina-japanan Komercon kaj Kisuke Mijagoŝi, ĉefo de la Ligo por la Akcelo de Ĉina-japana Komerco, konsistanta el membroj de la Japana Parlamento.

La kontrakto plue disvolvas iniciatojn faritajn ĉe la Internacia Ekonomia Konferenco kies centra celo estis "trovi eblojn por plibonigi la vivkondiĉojn de la popolo per la paca kunlaboro de malsamaj landoj kaj malsamaj sistemoj kaj la disvolvo de ekonomiaj rilatoj inter ĉiuj landoj." Dum ĉi tiu konferenco, la ĉina delegitaro jam konkludis import-eksportajn kontraktojn kun komercistoj el Britio, Francio, Belgio, Nederlando, Svislando, Cejlono, Indonezio, Pakistano, Finnlando kaj Italio ĝis la valoro de pli ol 223 milionoj da Usonaj dolaroj. La subskribo de la kontrakto estas ankaŭ plua pruvo de la "konsekvenca deziro de la ĉina popolo por establi pacajn komercrilatojn kun la popolo de ĉiuj landoj surbaze de egaleco, reciproka profitigo kaj kunlaboro," kiel diras la Pekina *Popola Tagjuralo* en sia ĉefartikolo. Ĝia efektiviĝo forte benefikos al la japana ekonomio.

Sub la superregado de la Usona okupo, la japana ekonomio estis suĉita en la movsablajon de imperiista militpreparado kun ĝia akompananta malaltigo de la vivnivelo de la popolo. Inter la printempo kaj vintro de lasta jaro, ekzemple, 26 japanaj teksaj kompanioj kaj komercejoj deklaris bankroton. Teksejoj fermiĝis pligrandigante la vicojn de la senlaboruloj pro "superprodukto," dum la meznombra jara konsumo de kotonŝpinaĵo de la japana popolo reduktiĝis ĝis nur du funtoj por ĉiu homo—nur triono de la antaŭmilita cifero. La Usonaj okupaciistoj malhelpas la japanan

popolon aĉeti kaj vendi en la merkatoj tion kio estas plej avantaĝa al ili. Ekzemple, ili estas malhelpataj de aĉetado de ĉina karbo je Us. \$17 por unu tuno kaj devigataj ĝin aĉeti el la inflaciita usondolara regiono je Us. \$28-29 por ĉiu tuno. Sojaj faboj el Ĉinio povus esti aĉetataj je Us. \$100 por unu tuno anstataŭ la Us. \$165 por unu tuno nun postulataj de usonsuperegataj liverantoj. Usona komercpolitiko elfermas la japanan ekonomion el ĝiaj naturaj merkatoj. La tuta volumeno de eksterlanda komerco de Japanio en 1950 reduktiĝis ĝis nur triono de la mezvolumeno de negoco inter 1934 kaj 1936.

Nan Han-ĉen en sia parolo ĉe la subskriba ceremonio substrekiis tiajn konsiderojn kiam li diris:

"En la pasinteco, estis tre intimaj ekonomiaj rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio.

"Tre vastaj estas la prospektoj de komerco inter la popoloj de Ĉinio kaj Japanio. La rapidaj restarigo kaj disvolvo de industrio kaj agrikulturo en nova Ĉinio ebligis eksporton de grandaj kvantoj da agrikulturaj, bestaj kaj mineralaj produktoj, kaj ankaŭ aliaj lokaj kaj specialaj produktoj. Samtempe, la altigita aĉetpovo de la ĉina popolo, la grandigo de la enlanda merkato kaj la entrepreno de grandskala ekonomia konstruo jam donis al Ĉinio grandan kapablon por importi industrian ekipaĵon, industriajn materialojn, krudajn materialojn, duonfinitajn varojn kaj manufakturaĵojn el fremdaj landoj.

"Ni kredas ke ĉi tiu kontrakto plivastigos la eblecojn de komercrilatoj kaj helpos la starigon de novaj rilatoj de paco kaj amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Japanio.

"Por efektiviĝi ĉi tiun kontrakton, ni bonvenigos reprezentantojn de privataj industriaj kaj komercaj entreprenoj en Japanio kiuj volus veni al Pekino por subskribi kontraktojn por plua akcelo de ĉina-japana komerco."

S-ino Tomi Kora, delegito de la japana grupo, diris:

"La Ĉina-japana Komerckontrakto subskribita ĉi tie hodiaŭ....simbolas la amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj Japanio. Ĝi baziĝas sur la spirito de la Internacia Ekonomia Konferenco, tio estas, egaleco kaj reciproka profitigo, respekto por nacia sendependeco kaj ne-entrudiĝo en internaj aferoj. Samtempe, ĝi estas kontrakto de historia signifo surbaze de la principo de mondpaco. Mi kredas ke ĝin aplaudos la pacamantoj de ĉiuj landoj...."

Trad. Venpino

Teksto de la Ĉina-japana Komerckontrakto

Jene estas la enhavo de la Ĉina-japana Komerckontrakto subskribita en Pekino je la 1-a de junio inter Nan Han-ĉen (la unua partio) kaj Tomi Kora, Kei Hoaŝi kaj Kisuke Mijagoŝi (la dua partio):

1. La valoro de la varoj aĉetotaj aŭ vendotaj de ĉiu partio estas 30 milionoj da sterlingoj.
2. Ambaŭ partioj konsentas al reciproka interŝanĝo de varoj de la samaj kategorioj. La klasifiko

de la varoj eksportotaj de ĉiu partio (kiu troviĝas en la detala listo almetita al ĉi tiu kontrakto) kaj ilia procento de la tuta valoro estas kiel jene:

Varoj eksportotaj el Ĉinio:

Kategorio A ampleksas 40% de la tuta valoro. Kategorio B ampleksas 30% de la tuta valoro. Kategorio C ampleksas 30% de la tuta valoro.

Varoj eksportotaj el Japanio:

Kategorio A ampleksas 40% de la tuta valoro. Kategorio B ampleksas 30% de la tuta valoro. Kategorio C ampleksas 30% de la tuta valoro.

3. **Komerco inter la du partioj procedos sur bazo de interŝanĝo kaj estos taksata laŭ sterlingo.**

4. **Por helpi la praktikan efektivigon de la kontrakto, la dua partio sendos delegitojn por negoci kun la unua partio pri la kvanto de la varoj acetataj kaj vendataj, iliaj normoj kaj prezoj, kaj la tempo kaj loko por la transigo de la varoj, ktp. La delegitoj de la dua partio estos formalaj delegitoj reprezentantaj japanajn civilajn industrion kaj komercon kaj la intertraktadoj limiĝos en komerco.**

5. **Metodoj de transporto kaj elsaldo estos diskutataj kiam la detalaj kontraktoj subskribiĝos.**

6. **En kazoj de disputoj inter la du partioj en ilia efektivigo de la kontraktoj, ili starigos arbitracian komitaton kaj tia arbitracio okazos en Ĉinio.**

7. **Ĉi tiu kontrakto devos esti efektivigita antaŭ la 31a de decembro, 1952. Se la negocoj ne kompletigos**

je tiu dato, ĝi povos esti konvene etendita per konsento de la du flankoj kun konsidero de la kondiĉoj.

8. **La kontrakto havas ĉinan kaj japanan tekstojn, ambaŭ de kiuj estas egale validaj.**

(Subskriboj)

APENDICO

Detala listo de varoj klasifikitaj.

Ĉinio eksportas:

Kategorio A: Karbo, sojfabo, mangan-mineralaĵo, fermineralaĵo, porkharegoj.

Kategorio B: Salo, miksitaj faboj, arakidkerno, tungoleo, magnezi-mineralaĵo, baŭksito, fluorspato...

Kategorio C: Kotonsema kuko, porkhaŭto, talko, grafito, gipso, orpimento, gajlo, rezino...

Japanio eksportas:

Kategorio A: Kupra ingoto, ŝtalplato, ŝtaltubo, konstruaj ŝtalmaterialoj, fervojaj ŝtalmaterialoj...

Kategorio B: Teksaj maŝinoj kaj akcesoraĵoj, vaporŝipoj (frostigaj vaporŝipoj), lokomotivoj (malpeza tipo), insektmortigilo...

Kategorio C: Agrikulturaj maŝinoj kaj akcesoraĵoj, bicikloj, aŭtopartoj, skribmaŝinoj, mikroskopoj, termurzaj instrumentoj...

Principe, interŝanĝo estos reciproka inter varoj de la sama kategorio. La konkretaj detaloj koncerne kiuj varoj de ĉiu kategorio estos interŝanĝataj estos traktataj per interkonsento inter la du flankoj kiam la kontraktoj estos negocataj.

Deklaracio - - -

(daŭrigo de p. 148)

Ni forte unuigu ankoraŭ pli vaste! Ni agu pli firmvole en unueco kaj pli energie surŝultrigu la noblan taskon de pacdefendo!

La homa racio kaj internacia justeco certe venkos la agresan perfortecon kaj militon.

(Subskribis)

Kuo Mo-ĵo, V. Kojevnikov, Liu Ning-ĵi, Duong Bach Lien, S. Tularak, Ada Bromham, G. R. Van Eerde, A. T. Gietzelt, John W. Burton, S. L. Macindoe, U Hla, U Myo Myint, U Thein Pe Myint, U Aye Kyi, U Hkun Hti, Thakin Lu Aye, Mary Jennison, U. Saranankara, Venturelli, Ĉen Ŝu-tung, Han-ĉen, Vu Jaŭ-zung, Li Teh-ĉuan, D. D. Kosambi, Sardar Gurbakhsh Singh, Indulal Kanaiyalal Yagnik, Suroso, Suwarti, Surjonegoro, Tomi Kora, Kei Hoashi, Kisuko Miyagoshi, Bak Cheng Ai, Jon Dong Hiok, Chan Suat Hong, Eli de Gortari de Gortari, Rafael Mendez Aguirre, Bazar Shirindib, Rewi Alley, H. Courtney Archer, M. A. Shakoov, Ghulam Mohammed Khan, Manuel Cruz, Prasert Supsoonthorn, John Adams Kingsbury, Hodjaev, Ivan Glushenko, Le Chan Phuong, John W. Darr, P. V. Gulyayev, Ernest Thornton S. S. Yusuf (observanto subskribis en la nomo de la Tuthindia Sindikata Kongreso).

Kontraŭ la Glacia

(daŭrigo de p. 164)

Ĉiuj stultiĝis pro la neatenditaĵo.

"Jes!" diris la knabeto kvazaŭ plende, "ĝi funkciis nur tiel mallongdaŭre..."

"Hm!" Hu Pin kvazaŭ diris al si mem kaj rigardis absorbite kun la okuloj fiksaĵ. "Eble refoje tiu punkto..." Parolante li retiris la demetotan pluvomantelon sur siajn ŝultrojn kaj foriris: "Atendu! Ĝi baldaŭ funkcios."

"He, revenu, Hu Pin, revenu, Hu Pin! Alia homo iru. Vi jam tiel frostiĝis..." La direktoro vokis lin ripete kun zorgemo.

"Mi iru!"

"Mi iru!"

La komunikisto kaj la knabeto vetproponis.

"Ne, ne!" En la pluva susuro. Hu Pin, laŭtigante sian voĉon, respondis al la direktoro dum la irado: "Mi estus tute kontenta, eĉ se tio kostus mian vivon... Cetere la aliaj ne estas spertaj en tia afero!"

La formortanta voĉo fine dronis en la pluva susuro.

(daŭrigota)

Batalo kontraŭ la Inundminaco Laŭlonge de la Jangze-rivero

Su Ming

Kiam la grandioza projekto de river-subjugado en la Huaj-baseno marŝas kun plena rapideco en sia dua jaro, du cent mil aliaj riverbatalantoj jam finis sian laboron en la meza parto de la Jangze-rivero je la 20a de junio.

La Jangze-rivero estas unu el la ĉefaj riveraj arterioj de Ĉinio. Originante el la montoj de Ĉinghaj-provinco, en la sama regiono kiel la deveno de la granda Flava Rivero, ĝi fluas malsupren tra la pitoreske famaj Tri Montgorĝoj al la orienta ebenaĵo de Kiangsu-provinco kaj enfluas en la Orientan Maron pli ol 5,500 kilometrojn for. Laŭlonge de ĝia baseno estas kelkaj plej riĉaj kaj fekundaj regionoj de la lando. Seĉuan en kiu ĝi amasigas akvon de multaj riverbranĉoj, estas konata kiel "la ĉiela regno". La provincoj Hunan kaj Kiangsu estas famaj pro la abundeco de siaj rizrikoltoj. Dum centoj da jaroj Jangze estis la ĉefa komunika linio por Sudokcidenta, Centrasuda kaj Orienta Ĉinio kaj laŭlonge de ĝiaj bordoj troviĝas multaj prosperaj urboj kiel Ĉungking, Iĉang, Ŝasi, Uhan, Kiukiang, Nankino kaj Ŝanhajo.

Ĝenerale la Jangze-rivero neniam prezentis tian saman minacon de inundo kian la Huaj-rivero kaj la Flava Rivero. Tamen en ĝia meza valo troviĝas 300-kilometra parto kiu restas konstanta minaco al 533,000 hektaroj da tero sur la norda bordo loĝataj de tri milionoj da popolanoj. Estas ĉi tiu parto de la rivero etendiĝanta orienten de Kjukiang en Hupej-provinco ĝis Ĉenglingki sur la Tungting-lago en Hunan-provinco, al kiu la nuntempa laboro koncentriĝas. Tiu meza parto de la Jangze-rivero estas kutime konata kiel la King-rivero.

Kiam la Jangze-rivero elfluas el la montgorĝoj, ĝia akvo dividiĝas, parte fluante orienten tra malvasta, serpentumanta akvovojo, kaj parte farante flankan vojon tra la Tungting-lago per kvar apartaj riveretoj. La maksimuma volumeno de la ĉefa akvovojo ĉe Ŝasi estas 46,000 kubmetroj posekunde, kaj la fluo dum ĝia superakvado en 1931 estis laŭ kalkulo ĉirkaŭ 60,000 kubmetroj posekunde. En 1931 la akvo de la Jangze-rivero leviĝis pli alte ol en ĉiu ajn tempo dum la pasintaj kvindek jaroj. Seriozan perdon kaŭzis tiujara inundo al la tri milionoj da loĝantoj en ĉi tiu regiono. La digo konata kiel la granda King-digo, kiu kuras 133 kilometrojn laŭlonge de la norda bordo en ĉi tiu parto, protektas la vastajn ebenaĵojn norde de la rivero laŭlonge de la akvovojo. Sed ĝi estis neniam dece prizorgata dum la Kuomintanga regado. Breĉiĝo de la digo endanĝerigus milionojn da vivoj kaj centmil hektarojn da tero.


La ĵus efektivigita projekto kiu forigis la minacon de inundo de ĉi tiu regiono estis grandioza.

Prepara laboro jam komenciĝis en novembro, 1950, kiam la Akvokonserva Administracio de la Jangze-rivero sendis teknikistojn kaj inĝenierojn por priesplori kaj fari detalan planon. Dum la sekvantaj dekkvar monatoj, streĉitaj topografia kaj hidrologia studoj pri la rivero estis farataj. En januaro, 1952, planoj estis

kompletigitaj kaj submetitaj por aprobo, kaj je la 31a de marto la Centra Popola Registaro donis instrukcion, ordonante tuj komenci efektivigon de la projekto. La laboro oficiale komenciĝis je la 5a de aprilo.

La ĉefa trajto de la plano estas la konstruo de granda inundakvo-retena konservejo kun entena kapablo de ĉirkaŭ 5,500 milionoj da kubmetroj da akvo. Tio signifas ke ĝi povas enteni la maksimuman inundakvon kiel tiun en 1931 kaj malaltigi la fluon ĝis 46,000 kubmetroj posekunde. La konservejo ampleksas 921.34 kvadratajn kilometrojn da tero, sude de la Jangze-rivero kaj oriente de la Hutu-rivero. Por prepari la laboron, 230,000 kamparanoj, helpate de la registaro, estis translokigitaj de ĉi tiu regiono al de inundo sendanĝeraj lokoj en Ŝihŝoŭ-gubernio cent liojn for, sur la norda bordo de la Jangze-rivero en Hupej-provinco.

Ĉi tiu konstrua laboro inkludas la plifortigon de digoj, la konstruon de giganta kluzo kaj kluzpordoj kaj la renovigon de dragaj sistemoj. Digo postulanta 12,000,000 kubmetrojn da terlaboraĵo estas konstruita sude de la rivero por ĉirkaŭi la inundakvo-detenan konservejon. Regulatoro kun 54 enfluejoj, ĉiu 18 metrojn larĝa kaj 4 metrojn alta, kaj kun longeco de pli ol unu kilometro estas konstruita ĉe Tajpingkoŭ, ĉe la enirejo de la konservejo. Ĉi tiu regulatoro estas la plej granda en Ĉinio, duoble pli granda ol tiu ĉe



Usona Komandanto Konfesas Koĵe-ajn Kruelegajojn

Koĵe-aj militkaptitoj faris jenajn postulojn al la Usona komandanto:

1. Tuja ĉesigo de la barbaraj rimedoj uzataj de via komandejo: insultoj, minacoj, torturo, devigi nin protesti nian reenpatriigon per ĵuroj subskribitaj en sango, malliberigo, amasmurdo per pafiloj kaj maŝinpafiloj, uzo de venena gaso, bakteriaj armiloj, kaj uzo de militkaptitoj kiel objektoj por eksperimentoj per atombomboj. Vi devas garanti la homajn rajtojn kaj vivojn de militkaptitoj surbaze de internacia leĝo.
2. Tuja ĉesigo de kontraŭleĝa kaj senracia "volonta reenpatriigo" de militkaptitoj de la Korea Popola Armeo kaj Ĉinaj Popolaj Volontuloj.
3. Tuja ĉesigo de deviga esploro (kribrado), la celo de kiu estas rearmiti milojn da militkaptitoj de la Korea Popola Armeo kaj Ĉinaj Popolaj Volontuloj kaj sendi ilin kontraŭleĝe en konstantan sklavecon.
4. Tuja agnosko de la reprezentanta grupo de militkaptitoj, konsistanta el la militkaptitoj de la Korea Popola Armeo kaj la Ĉinaj Popolaj Volontuloj, kaj intima kunlaboro kun ĉi tiu grupo de via komandejo.

Brigada Generalo Charles Colson respondis al ĉi tiuj postuloj:

Mi ja konfesas ke estis kazoj de sangverŝo kie multaj kaptitoj estis mortigitaj kaj vunditaj de la fortoj de la Unuigitaj Nacioj. Mi povas certigi al vi ke estonte la militkaptitoj povas atendi humanan traktadon en ĉi tiu kampadejo laŭ la principoj de internacia leĝo. Mi volas fari ĉion en mia povo por elimini pluan perforton kaj sangverŝon. Se tiaj incidentoj okazos estonte, mi valas esti respondeca.

Tio estas afero kiu estas diskutata ĉe Panmunĵom. Mi havas nenian kontrolon aŭ influon super la decidoj ĉe la packonferenco.

Mi povas vin informi ke post la liberigo de Generalo Dodd, nevundita, ne estos plu deviga kribrado aŭ iu ajn rearmano de militkaptitoj en ĉi tiu kampadejo, nek estos farata iu ajn provo de nominala kribrado.

Brigada Generalo Charles Colson konsentis al la lasta postulo en sia subskribita letero kiu estis transdonita al la Koĵe-aj militkaptitoj je la 10a de majo.

Ĵunhoki sur la Huaj-rivero. Alia regulatoro kun 32 enfluejoj, ĉiu 9 metrojn larĝa kaj 6 metrojn alta, kaj kun longeco de ĉirkaŭ 330 metroj, estas ankaŭ konstruita proksime de Huangŝantoŭ trans la Hutu-rivero por reguligi akvon fluantan en la Tungting-lagon. Por la nuna tempo, unu arbitraj-teraja kluzo kun masonaja planko kaj abutmento ĉe Vuliang-an reguligos la elfluon de la akvo el la detena konservejo al la Jangze-rivero.

Drenaj sistemoj kaj elfluejoj estas ankaŭ provizitaj por la retena konservejo por ke la akvo povu esti ĝustatempe fordrenita por ebligi la kreskigon de vintraj kreskaĵoj. Ŝirmzonoj de arboj plantitaj proksime de la digo donas plian protekton.

Samtempe kun la konstruo de la retena konservejo, la King-digo estas plifortigita kiel alia antaŭzorga aranĝo.

Sovetiaj akvokonservaj spertuloj estas laborintaj sur la projekto kaj donadis valoregajn konsilojn. Ekzemple, en la komenco oni antaŭkalkulis ke pli ol 500,000 tunoj da sablo kaj ŝtono devas esti transportitaj al la konstruaj terenoj de Iĉang, Jijang kaj aliaj lokoj centojn da kilometroj for, por esti uzataj en la farado de betono. Sed dank' al la iniciativo de la esploraj grupoj kaj kun la helpo de Kamarado Buĥov, Sovetia spertulo, escepte de parto de la sablo, rimedoj estis elpensitaj por utiligi lokajn materialojn. Pro la enkonduko de nova metodo de surrivera trenado laboro estas ege plirapidigita. Antaŭe trenŝipoj povis nur treni ses ŝarĝitajn barĝojn, sed kunligite kun la barĝoj per ŝnuro

kun centra ĉeno, ĉiu trenŝipo nun povas treni 22 barĝojn.

Provizaĵoj kaj ekipaĵoj fluis al la konstruaj terenoj de Ŝanhajo, Tajĵuan, Hankoŭ, Nankino kaj aliaj urboj. Laborherooj de unuoj de la Popola Liberige Armeo kaj veteranaj inund-kontraŭ-batalantoj de la Huaj-rivero konkuris unu kontraŭ la alia en laborkonkursoj. Malpezaj fervojoj por faciligi transporton estis instalitaj de ŝturmlaboristoj kun rekordrapida rapideco. Filioj de la Popola Banko kaj Poŝtoŝtationoj estis starigitaj. Centoj da medicinaj laborantoj faris konvenajn sanitarajn aranĝojn kaj forigis danĝerojn de publika sano.

Provizaj centroj de ĝeneralaj komercaĵoj estis starigitaj de komercaj fakoj de najbaraj gubernioj kaj urboj. La Ŝinhua-Libro-vendejo ankaŭ starigis servostaciojn sur la konstruaj terenoj. Laboristoj kaj kamparanoj de Hupej- kaj Hunan-provincoj plenanime subtenis ĉi tiun grandiozan projekton. Laboristoj en Uhan kaj Ĉangŝa produktis frajton post frajto da maŝinoj antaŭdate. Kamparanoj en la du provincoj laŭlonge de la Jangze-baseno organizis dum la printempa semado multajn interhelpajn grupojn speciale por helpi la familiojn de tiuj kiuj volontule laboris sur la rivero.

La ĵus efektivigita projekto kiu forigis la minacon de inundo por milionoj da kamparanoj estas la preludo de alia multe pli granda projekto entreprenota pli poste por konduki la tutan Jangze-riveron al servo de la popolo.

Trad. Cipao Nin





Kim Il Sung, ĉefkomandanto de la Korea Popola Armeo, kaj Peng Teh-huaj (maldekstre), komandanto de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj helpantaj la korean popolon en defendo de ilia lando, de paco kaj demokratio.

EN HEROA KOREIO

Koreaj popolaj armeanoj kaj ĉinaj popolaj volontuloj interŝanĝas spertojn en detruado de Usonaj aeraj piratoj.

La nevenkebla korea popolo restarigas sian ekonomon malgraŭ la ferocaj aeratakoj de la Usonaj agresantoj.
Riparo de cementa fabriko.



La Granda Kamaradeco de la Popoloj por Paco kaj kontraŭ Agreso

Internacia solidareco kaj amikeco tre bone manifestiĝis en la helpo kaj simpatio de la pacamaj popoloj de la mondo al la korea popolo.




Ĉinaj popoloj volontuloj helpas estingi fajron kaŭzitan de Usona gasolen-bombo (supre maldekstre).

Ili dividas siajn provizaĵojn kun la korea popolo (meze maldekstre).

Koreaj terkulturistoj kaj ĉinaj volontuloj plenumas printempan semadon (sube maldekstre).

Ĉinaj volontuloj helpas konstrui novan domon sur la ruinoj de la malnova (sube).





Doktoroj de la Volontula Medicina Korpuso de la Hungara Popolo operacias vunditan popolan batalanton ie en Koreio.

Koreaj virinoj rakontas al Monica Felton, de la Fakto-enketa Komisiono de la Virina Internacia Demokrata Federacio al Koreio pri Usonaj abomenaĵoj.



Korea patrino helpas amindan junan ĉinan volontulon per urĝa riparo al lia uniformo.





Delegitoj al la Prepara Konferenco por la Packonferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj kunsidas en Pekino.

La Prepara Konferenco por la Packonferenco de la Azia kaj Pacifika Regionoj

Kunligite kun la pacamaj popoloj de aliaj regionoj en la mondo, kiuj havas la samajn aspirojn, la popoloj de Azia kaj Pacifika regionoj certe povas gajni la venkon de paco super milito.

La popoloj de Azia kaj Pacifika regionoj jam konscias sian forton, kaj tial ili havas firman konvinkon pri la venko de la pacdefenda movado.

Se paco povas esti garantiata en la Azia kaj Pacifika regionoj, tio multege kontribuos al la tutmonda paco.

Ni forte unuiĝu ankoraŭ pli vaste !

La homa racio kaj internacia justeco certe venkos la agresan perfortecon kaj militon.

*El la Deklaracio de la
Prepara Konferenco*

Ĉinio Malaltigas Prezojn Ankoraŭfoje

Ke Kia-lung

Dum marto kaj aprilo, 1952, novaj prezmalaltigoj de artikloj por ĉiutaga uzo estis anoncitaj de ŝtataj kaj kooperativaj komercorganizoj tra tuta Ĉinio. Variante de 2 ĝis 40 procentoj depende de la individua artiklo, ili reprezentas meznombran malaltigon de 8% por la tuta serio de la koncernaj komercaĵoj. Kiel granda tiu ĉi serio estis, povas esti vidata de la fakto, ke, sole en Ŝanhajo, prezoj de pli ol 10,000 specoj da porkonsumaj artikloj estis reduktitaj. En Pekino preskaŭ 4,000 specoj da artikloj estis envolvitaj; en Hankoŭ kaj Centra-Suda Ĉinio pli ol 3,000; en Nord-okcidenta Ĉinio ĉirkaŭ 900; en Nordorienta Ĉinio pli ol 600; en Sudokcidenta Ĉinio ĉirkaŭ 1,500.

La nuna landskala ondo de "prezreduktoj" estas la dua en unu sola jaro. La lasta okazis inter aŭgusto kaj oktobro 1951 kaj aplikis al tiaj aĵoj salo, manĝeblaj oleoj, sukero, karbo, petrolo, gasoleno, ŝtalplatoj, zinkplatoj kaj feraj tuboj (en Tienzino, ekzemple, la reduktoj estis de 6,6% ĝis 8,4%). Kelkaj artikloj estis prezmalaltigitaj dufoje en 4 monatoj: kiel en la kazo de salo, manĝeblaj vegetaĵaj oleoj kaj sukero la prezoj malaltigis duafoje lastan novembron. Prezmalaltigoj de ŝtataj kaj kooperativaj komercorganizoj estis neeviteble sekvitaj de la falo de ĉiuj prezoj en privataj vendejoj.

Supereco de Popola Regado

La fakto, ke la ĉina konsumanto ambaŭ ĝuas pli-grandiĝantan enspezon kaj pagas malpli por la produktaĵoj kiujn li uzas ĉiujare, estas atesto de la supereco de la novdemokratia ekonomio super la kapitalista. Nur en la landoj de socialismo kaj de popola demokratio tio estas ebla. Tio estas tuj videbla per referenco al samtempaj kondiĉoj en kapitalistaj kaj koloniaj landoj. En Usono, ekzemple, la vivkostoj plialtiĝis je 20% inter frua 1950 kaj oktobro, 1951, dum la realaj salajroj malaltigis konsiderinde. En Britio, la vivkostoj plialtiĝis je 25% nur en la daŭro de 1951; en aliaj okcidenteŭropaj landoj ankoraŭ pli.

La lastaj prezreduktoj, plue, ne sole respegulas la florantan plialtiĝon de la ĉina ekonomio sub la nova demokratio, sed ankaŭ la sukceson de la granda landskala movado, kiu estis iranta dum kelkaj monatoj kontraŭ koruptiĝo, malŝparo kaj burokratismo. Tiu ĉi kampanjo purigis ŝtatajn kaj kooperativajn komercorganizojn de koruptaj elementoj, kiuj lasis sin subaĉeti de liverantoj kaj entreprenantoj. Ĝi ankaŭ kaŭzis ekskuon de la personaro kun malŝparemaj laborkutimoj aŭ senrespondeca sintenado al la propraĵo kaj bonstato de la popolo. Ŝtataj komercentreprenejoj estas nun irigataj de politike konsciaj kaj profesie kompetentaj personoj, kiuj ne havas sintenadon de subservemo aŭ naivan fidon rilate kun privataj komercistoj, insistas pri zorgema kalkulo kaj estas motivigitaj de la deziro servi la popolon.

Rezultoj de Grandaj Kampanjoj

Ilustraĵo de la rezultigintaj ŝparoj al la konsumanto povas esti vidata en la kazo de la Pekina filio de la ŝtata Ĉina Magazeno, kiu kutimis provizi privatan

kotonfabrikon per pakajo da ŝpinaĵo por 90 paroj da ŝtrumpetoj teksitaj, donante ekstran pagon por fabrikado. Nun, kiel rezultato de la elimino de koruptiĝo kaj malŝparo, la sama kvanto da ŝpinaĵo produktas 93 parojn da ŝtrumpetoj, kaj la fabrikad-pago malaltigis kvarone, ankoraŭ lasante al la privata entreprenanto profiton de 5-10%.

Paralela kampanjo inter privataj komercaj rondoj (kontraŭ subaĉeto, impostevito, ŝtelo de ŝtata propraĵo, trompo ĉe ŝtataj kontraktoj kaj ŝtelo de ekonomia informo por spekulado) havis pluajn bonefikajn rezultojn. Privataj entreprenoj fortranĉitaj de kontraŭleĝaj fontoj de profito, turnas sian atenton al pli ekonomia administrado kaj pli efika produktado. La plej grava garantio de la funkciado de privataj entreprenoj en akordo kun la interesoj de la popolo estas la akra altiĝo de klaskonscio kaj nivelo de organizado akirita dum la kampanjo en la vicoj de laboristoj kaj komizoj en privataj industrio kaj komerco. La plialtigita aktiveco de laboristaj sindikatoj certigos, ke kapitalistoj honoras la devojn kiujn ili prenas sur sin en rilato al ŝtataj kontraktoj.

Ĉi tie ankaŭ ekzemplo de la Pekina filio de la Ĉina Magazeno estas instrua. Privata sukerajisto kutimis provizi la vendejon per biskvitoj, kukoj kaj dolĉaĵoj por podetala vendo. Dum la kampanjo laboristoj en la sukeraĵejo malkaŝis, ke la posedantoj pagigis por lakto-pulvoro, kiam ili uzis farunon, por butero, kiam ili uzis vegetaĵan oleon, por ovojn, kiam ili nur uzis sodon por baki, farante meznombran profiton de 50% kaj tiel altan kiel 120% por kelkaj aĵoj. Nun tiu ĉi fiago estas malkaŝitaj kaj korektitaj. La sukerajisto provizas bon-kvalitajn produktaĵojn je prezoj meznombre 28% sub tiu antaŭe pagigitaj, kaj ankoraŭ faras meznombran profiton de 21%.

Landskalaj Reduktoj

La lasta prezredukto komenciĝis en Ŝanhajo, la urbo, kiu produktas 80 procentojn de la fabrikitaj artikloj por ĉiutaga uzo de Ĉinio. Ĝi estis tuj sekvita de malaltigoj en Pekino, Tienzino, Kanton, Hankoŭ, Ĉungking kaj aliaj urboj, disvastiĝante poste al tiaj malproksimaj regionoj de Ĉinio kiel Sikang, Sinkiang kaj Hajnan-insulo. Ĉie ili alportis senperan bonon al la popolamasoj, precipe la laboristoj kaj kamparanoj. Ĝis aprilo la ĝenerala prezindekso por la lando (bazita sur ĉiuj komercaĵoj ne sole la prezmalaltigitaj) estis 5 procentojn pli malalta ol tiu de decembro, 1951.

Tio sola reprezentis landskalan pliiĝon de realaj salajroj je 5 procentoj. La pliboniĝo de la vivnormoj povas esti imagata, se oni konsideras, ke la senpera pliiĝo de salajroj tra la tuta lando depost liberigo estis tre granda (en Nordorienta Ĉinio salajroj en junio 1951 estis 260 procentojn pli altaj ol en marto 1948).

La aĉetpovo de la tuta ĉina popolo estis 22 procentojn pli alta en 1951 ol en la antaŭa jaro kaj estas plialtiĝanta senĉese en 1952.

En ĉinaj urboj oni povas vidi la vivantajn rezultojn de tiaj ŝanĝoj. Kurantaj raportoj de ŝtatirigataj kaj

(daŭrigo sur P. 161)

Miaj Impresoj pri Nova Ĉinio

D-ro James G. Endicott*

Prezidanto de la Kanada Packongreso

Mi kaj mia edzino jam finis nian longan viziton al nova Ĉinio. Se ni volus rakonti ĉiujn niajn impresojn, estus necese skribi tutan libron. Ĉiokaze, ni povas nur mencii kelkajn de la plej gravaj punktoj.

Ĉar ni dediĉas nian tutan tempon al la tasko de pacmovado en Kanado, la plej grava fakto kiun ni atestis estas tio, ke ĉiu homo, ĉiuloke de Berlino ĝis tie ĉi en Pekino, kaj tra la tuta Ĉinio, volas pacon. Ĉie ni vidis kaj esploris grandajn planojn por homara feliĉo, precipe la gigantajn laborojn de akvo-subjugado kaj irigacio en Sovetunio kaj en Ĉinio sur la Huaj-rivero kaj la Flava Rivero. La planoj, kiujn la popolo estos entreprenanta en la venontaj dek aŭ dudek jaroj, estas klaraj kaj nerefuteblaj pruvoj ke paco estas ege dezirata de la tuta popolo.

Kelkaj homoj en la Okcidento probable min demandos: "Se la popoloj de Azio tiel forte deziras pacon, kio estas la kaŭzo, ke estas batalado en multaj lokoj?" La respondo estas simpla. Jam venas la tempo, kiam la kolonia sistemo devas esti abolita. Koloniaj sistemoj, kiaj tiuj de Anglio, Francio, Nederlando, kaj nun, Usono, havas sian bazon sur milita subpremo kaj armita rabado al la popolo. Tiuj ĉi sistemoj estas ĝis nun subtenitaj de armeformo de eksterlando. Ili estas malmalmodernaj, perforte subpremaj kaj kontraŭ-demokratiaj. Tiel longe kiel ekzistas koloniismo, ne povas esti justeco, homa egaleco aŭ ĝusta rilato inter homoj. Se la okcidentaj kapitalistaj nacioj volas pacon, ili donu tiuj sendependecon al la koloniaj popoloj, ĉiuloke en la mondo. Tio estas la respondo.

La Organizo de Nord-Atlantika Traktato estas reale "Klubo de Blankaj Homoj por Daŭrigado de Kolonia Subpremo". La Usona grandskala disvolviĝo de bakteria milito estas reale vana provo serĉi solvon por la fakto, ke estas pli ol 1,000 milionoj da popolanoj en la koloniaj kaj antaŭe koloniaj areoj, kiuj postulas liberiĝon. Estas nur 250 milionoj da blankhaŭtaj homoj en la imperiista bloko, kaj nun plejparto de ili ne volas esti sendataj por morti en senutilaj militoj en Azio kaj Afriko nur por la profito de tiuj homoj en Anglio kaj Usono, kiuj jam havas tro multe da mono.

Mi jam diris ĉi tiujn vortojn en ĉiu packunveno en Kanado dum la pasintaj tri jaroj, kaj mi daŭrigos diri ilin ĝis la tempo kiam miaj homfratoj kaj homfratinoj en ĉiuj koloniaj areoj akiras liberiĝon kaj justecon kaj egalecon.

Ĉina Registaro Ĝojigas Min

Mi estas ĝoja vidante per miaj propraj okuloj, kiel sincera kaj praktika estas la nova Popola Registaro de Ĉinio. Ĝi vere kaj juste reprezentas la kvar klasojn kiuj unuigas en komuna protekto de ilia nova lando kaj la grandaj progresoj kiujn ili jam atingis. Tiu ĉi registaro estas honesta, progresema, sperta, kaj tiel servas la popolon, kiel ankoraŭ neniu registaro en la tuta historio de Ĉinio jam servis la *laŭ paj sing***. Tiu ĉi registaro estas tiel klara en siaj principoj kaj intencoj, tiel honesta kaj produktiva de bono en siaj rezultoj, ke ĉiu povas ĝin kompreni kaj ĝin ŝati, escepte de la

Okcidentaj militaristoj kaj la profitavidaj ekspluatantaj imperiistoj.

La *san fan* kaj *u fan* movadoj† estas mirinda ekzemplo de la kuraĝo kaj honesteco de la Popola Registaro kaj la gvidado de la Ĉina Komunista Partio. Tiuj ĉi movadoj estas necesaj en la nuna tempo por forviŝi kaj purigi la restaĵojn de la malnova putranta kutimo de korupta alproprigo kaj por haltigi ian regreson de la registaraj membroj al la pasintaj krimaj manieroj. La Registaro kaj la Komunista Partio montras, kiel tute diferenca ili estas ol ia ajn antaŭa registaro je tio, ke ili komencas la *san fan* movadon inter si mem. Ili estas severaj al si mem kaj indulgemaj al aliu kiuj estas ankoraŭ sub la influo de la pasinta malbona sistemo. Tiuj ĉi movadoj ne sole multe fortigas Ĉinion ekonomie, sed ankaŭ kreis grandan novan moralan forton tra la tuta lando.

Mi estas precipe interesita en tiu ĉi morala purigado pro tio ke mi estis misiisto en Ĉinio dum multaj jaroj. Mi observis la emfazon kiun oni insistas sur la neceseco de publika konfesado de malbonfaraĵo; la konfidon al la bona volo de siaj homfratoj; la pardonemon kiu estas donata al tiuj kiuj plene konfesas kaj sincere pentas. La celo de la movado estas reformi homojn, bonigante la malbonajn kaj fortigante la morale malfortajn. Ili estas la plej sukcesaj movadoj de tia speco kiun mi iam vidis.

Mi povas foriri de Ĉinio, kun 100-procenta optimismo en mia perspektivo, ĉar, vere, se vi povas gajni la grandan batalon de la *san fan* kaj *u fan*,—tion mi jam vidis vin batali kaj gajni,—sendube vi povos konkuri iun ajn kaj ĉiaspecan malfacilaĵon en la estonteco.

La merita kontribuo farita antaŭ ne longe de la Ĉina Delegacio ĉe la Internacia Ekonomia Konferenco estas bona ekzemplo de la racieco kaj prudenta sintenado de la Popola Registaro al ĉiuj internaciaj problemoj. En Ĉinio estas nova kaj justa komerca politiko. Iu ajn, kiu deziras esti amika, povas komerci kun reciproka profito kaj sur ĉiam pli ekspansianta skalo. Nur tiuj, kiuj havas kaŝitajn kaj malicajn imperiismajn planojn en sia penso, povas rifuzi tiajn amikajn proponojn. Nur tiuj, kiuj estas obstine planantaj militon kontraŭ la ĉina popolo volas opozicii tian ĉi novan kaj honestan komercon.

Libereco de Religio

Dum tiu ĉi vizito al nova Ĉinio, mi vidis, ke por ĉiuj religioj estas plena libereco. Mia kariero de misiisto donis al mi ŝancon por multaj paroladoj kaj kunsidoj kun la ĉinaj kristanoj. Mi vidis, kun kia intenseco ili penas forigi la profundan, subtilan influon de imperiismo super la eklezio. Nun mi jam persone vidis, kiel multe pli bona estas la vivo por la ĉina popolo, ekzemple, la manieroj en kiuj tiaj grandaj konstruaj projektoj, kiaj sur la Huaj-rivero estas sekurigantaj la vastajn profitojn, rezultantajn de agrara reformo, kiujn mi propraokule vidis en diversaj regionoj. Ĉio ĉi tio donis al mi pli klaran kaj pli doloran kom-

preniĝon de la falseco de la raportoj kiuj estas faritaj en la Okcidento de multaj misiistoj kiuj hejmeniris de Ĉinio. La favoraj raportoj faritaj de kelkiuj estas supernombrigitaj de la mallumaj fiktivaĵoj pri "subpremo kaj timo" disvastigitaj de aliuloj.

Kiam mi estas tie ĉi, vidante la ĉinan popolon kiu peneghe laboras por plibonigi sian vivon, mi konstante min mem demandas, kiel tiaj misiistoj povas esti indiferentaj aŭ ignori la manieron en kiu la Usona imperismo estas uzanta ĉiun rimedon por mobilizi la Okcidenton por milito kontraŭ Ĉinio. Kial tiaj misiistoj ne pripensas, ke se ili donus klaran kaj honestan rakonton pri la bono kiu jam venis al Ĉinio post liberigo, Usono ne povus mobilizi la Okcidenton por milito. Kiel povus la Usona registaro kuraĝi uzi tiun ĉi diablan bakterimiliton kontraŭ la ĉina popolo, se la Usona popolo estus jam ĝuste kaj dece informita pri la nova reĝimo en Ĉinio?

Ĉinaj religiaj anaroj, inkluzive la kristanan eklezion, havis sian plenan voĉrajton en la formado de la Komuna Programo. Ili subtenas ĝin tutkore. En ĉiuj registaraj komitatoj, de vilaĝo-rango ĝis la Centra Popola Registaro, troviĝas kristanaj reprezentantoj. Ili esprimas siajn pensojn kaj opiniojn libere kaj sen ia timo kaj deteniĝo. Ili scias, ke por la unua fojo en la historio de Ĉinio ili havas puran registaron kiu aŭskultas al la popolo kaj agas konforme al iliaj deziroj.

Granda Nordoriento

Esepte de mallongdaŭra vizito al Porto Arturo kaj Dajreno en 1927, tiu ĉi estas mia unua vizito al la granda Nordoriento de Ĉinio. Mia impresoj pri la lando, kia vidiĝis tra la vagonaraj fenestroj, estas tio, ke granda parto de ĝi, precipe de Kinĉou ĝis Ŝenjang (Mukdeno) aspektas similaj al la tri okcidentaj provincoj de Kanado, Manitoba, Saskatchewan kaj Alberta. La grundo estas fabele riĉa je ĉia greno.

Nun ni povas vidi la komencojn de vastaj planoj de plibonigo en kiuj la liberigitaj kamparanoj ĝoje kaj konscie partoprenas. Dekdu mejlojn for de Fuŝun, la granda karbo-centro, mi haltis survoje por paroli kun kelkaj kamparanoj laborantaj sur la kampoj. "Kion vi intencas planti?" mi demandis. "Fabojn kaj terpomojn", li diris, kaj poste, kun la natura, digno kaj etiketo de norda kamparano, li prezentis la maljunulon apud si kaj diris, "Jen estas mia patro, li havas la aĝon de 63 jaroj. Ni estis dungitoj en la pasinteco, sed nun nia familio havas 7 mu-ojn da tero kaj ni povas manĝi bone kaj aĉeti novajn vestojn. "Mi demandis pri la kampanjo de pliprodukto kaj li kapjesis kaj klarigis sian parton en ĝi. Mi diris al li ke mi ĉagreniĝas pro la blovata sablo (kaŭzita de malforstigo de vastaj areoj sub la pasinta reĝimo) kaj li diris kun simpla konfido, "Nia Popola Registaro povas ĝin trakti. Ni plantos arbojn, havos irigacion kaj baldaŭ ni havos maŝinojn."

Tio, kion notas al si iu kanadano vojaĝante de la Huaj-rivero, tra la grandaj ebenaĵoj de Ŝantung-provinco kaj supren en la Nordorionton, estas la plugado per mano kaj per malgrandaj muloj kaj testude paŝantaj bovoj. Kiel granda kvanto da maŝinoj estos bezonataj por mekanikigi tiun ĉi ampleksan areon, kaj kiel taŭga ĝi estas por traktora kulturado! Se Kanado volus etendi komercon kun nova Ĉinio, je la kvanto de triono de tiom, kiom la Kanada Registaro estas elspezanta por preparadoj por milito kontraŭ la popoloj de Azio, niaj manufakturoj fabrikantaj traktorojn kaj agrikulturajn maŝinojn povus daŭre zumi dudek-kvin jarojn!

Kamparanoj kun Nova Riĉaĵo

Centoj da milionoj da kamparanoj kun nova riĉaĵo en siaj poŝoj, unufoje en siaj vivoj, bezonos domojn ekde nun, kaj ili bezonos aĉeti al si ekstrajn vestojn. Se eĉ duono de ili aĉetos novajn vestojn la venontan jaron, la nuna produktokvanto de teksaĵo en Ĉinio nepre ne povos kontentigi la postulon. Jen estas senfinaj eblecoj de komerco, ambaŭ en teksaĵo kaj en maŝinoj. Oni bezonas nur ekvidi la valoron de la eksporta komerco de Ĉinio en 1935 kaj 1936 por ekkoni, kiel ampleksa povas esti la komerco inter Kanado kaj Ĉinio. Mi observis kun intereso ke ĉiuj industrioj en la Nordoriento estas okupataj je la produktado de varoj por paco.

Estas facile kompreni, kial MacArthur kaj liaj japanaj milionulo-amikoj tiel deziregis sin starigi sur la Jalu-rivero. Estas vasta kuncentrigo de industrio kaj naturaj riĉaĵoj en la radio de granda arko kun centro ĉe la loko kie la invadantoj de MacArthur okupis la riverbordojn dum mallonga tempo.

La ridindeco de la Okcidentaj politikistoj ja kulminis je tio, ke ili pretendas, ke MacArthur kaj liaj japanaj kunuloj, kiuj antaŭe sangigis la ĉinojn en Manĉurio por establi tiujn gigantajn industriajn kompleksojn, kaj la Usonaj trupoj, estis agantaj konforme al la altaj principoj entenataj en la de MacArthur ofte ripetata preĝo, "Patro Nia". La realismaj ĉinoj kredas ke tio estas kazo de "diablo citanta Bibliion", kaj pri tiu ĉi interpreto mi tute samopinias kiel la ĉinoj.

Iu ajn prudenta persono, kun okuloj klarvidantaj kaj cerbo pensanta, kaj ne havanta antaŭjuĝon kreitan de Usona propagando, povas vidi, ke la Nordoriento de Ĉinio, subtenata de kelkcentoj da milionoj da popoloj, decideme volantaj vivi en paco, kapablas fiaskigi iun ajn Usona-japanan planon por nova konkero.

Ĉinio Povas Malvenkigi Bakterimiliton

En la Nordoriento mi jam enketis la nerefuteblajn atestaĵojn de Usona bakteria milito. La Usonaj bakteriaj militkrimuloj montras, ke ili havas la vidpunkton de "malnova eksperto pri Ĉinio". Ili mem ja estas la viktimoj de "MacArthurismo". Ili timas kredi la raportojn pri la kapablo kaj atingajoj de la nova Registaro, iu ajn favore raportanta pri nova Ĉinio estas aŭtomate denunciata kiel "komunisto" kaj tial ne inda je serioza pripenso. Tio, kion la Usonaj bakteriaj militaristoj faris, povus jam krei panikon kaj malordon en la malnova reĝimo de Ĉiang Kaj-ŝek. Sed ne nun. Nun la popolo jam lernis organizi sin mem; ili konfidas sian registaron, kaj la registaro havas bonegan sanitaran servon. Miloj da junaj entuziasmaj memvoluloj estas pretaj labori, kaj rapida, efika instruo povas esti donita per kino-edukado. Bakteria milito povas esti venkita de vekita kaj liberigita popolo.

Kiel forte ni bedaŭras, ke ni ne povas ĝisatenti por okulvidi vian grandan manifestacion de monda unuiĝo kaj paco je Majtago, sed ni krios trans la Pacifika Oceano, "Vivu la Popola Respubliko de Ĉinio, Vivu la granda unuiĝo de la popoloj tra la mondo!"

Trad. Fukango

* *Li restis en Ĉinio pli ol dudek jarojn kiel misiisto.*
** *Ĉina populara dirmaniero por "popolo".*

† *San fan en la ĉina lingvo signifas "tri kontraŭoj", u fan signifas "kvin kontraŭoj". (Vidu sur P. 58-59)*

AL OĈJOJ VOLONTULOJ

Karaj oĉjoj volontuloj:

Ni, pioniroj de la tuta Ruĝkravata Klaso, la Elementa Lernejo de Paŭkia-strato, Pekino, prezentas al vi varmajn bondezirojn kaj salutojn!

Venos nia infanago "La Unua de Junio". En tiu tago ni ĉiuj portante kolorajn nov-vestojn, kun puncaj kravatoj, manĝante bombonojn aĉetitajn de paĉjoj kaj panjoj, saltante kaj kantante celebros kune kun la tutmondaj infanoj nian propran festotagon. Ni iros en la parkojn remi kanotojn, ni vizitos kinejojn, ekspoziciojn kaj aliajn lokojn. Ni ankaŭ renkontiĝos kun literaturistoj, sciencistoj, muzikistoj, labormodeloj kaj batalherooj. Oĉjoj, ni ĉie floras kiel floroj en printempo, tra la tuta Pekino, tra la tuta Ĉinio.

Antaŭ tiel ĝoja festotago ni ekpensas pri vi. Dank' al via taga kaj nokta batalado kontraŭ la malamikoj por defendi nin, ni povas tiel feliĉe vivi. Vi en la fronto certe memoras pri ni, esperante ke ni bone lernos por servi al la patrolando post la plenkreskiĝo. Do, vi kompreneble tre ŝatas aŭdi pri niaj lernado kaj vivo, ĉu ne? Jene ni detale raportu al vi.

En la pasinta unu jaro, dank' al la fervora instruado de la instruistoj kaj la Organizo de Junaj Pioniroj, dank' al viaj oftaj kuraĝigoj per leteroj, ni pene lernadis. Ni 47 lernantoj de la tuta klaso ĉiuj estas akceptitaj kiel gloraj junaj pioniroj, kaj portas la belan ruĝan kravaton. Kaj sekve nia klaso estas glore nomata Ruĝkravata Klaso. Ni ĉiam penas por meriti tiun gloron. En la lasta lerneja sezono, en nia klaso, la atingoj de 37 lernantoj meritas la unuan

gradon kaj tiuj de la dek aliaj—la duan gradon. En nia klaso ekzistas neniu kiu ne sukcesis trapasi la ekzamenon aŭ kies atingoj meritas nur la trian gradon. Ni scias ke la celo de nia lernado estas por la patrolando. Ni tial ne nur mem bone lernas, tamen ankaŭ zorge helpas nnu la aliajn. Ni precipe amas la kolektivajn gloron de nia klaso. Se unu el ni postigas, la aliaj ankaŭ estas tre malĝojaj. Sub la direkto de la instruistoj ni fondis multajn eksterkursajn studgrupojn por naturo, literaturo, ĵurnallegado, radio ktp. En la Naturgrupo ni studas sciencajn sciojn kaj en la klasĉambro per niaj propraj manoj ni aranĝis "Sciencan Angulon", kie ni vicigis diversajn specimenojn kolektitajn de ni mem kaj modelojn faritajn de ni mem. Lasttempe por celebri la festotagon "La Unua de Junio", ni mem sukcesis fari malgrandajn telegrafajn elsendilon kaj ricevilon kaj magian lanternon. En la Literaturgrupo ni legas bonajn verkojn, deklamas poemojn kaj ankaŭ ofte voĉlegas la Raportojn el Koreio publikigitajn sur la Popola Tagĵurnalo kaj legas rakontojn pri via batalado kontraŭ la malamikoj. Ni abonas nian propran gazeton *Ĉinaj Geknaboj* kaj ĝin lagas en ĉiu semajno. En nia Radiogrupo ni ĉiutage zorge aŭskultadas la programojn por geknaboj disaŭditajn de la Centra Popola Radiodisaŭdiga Stacio. De la radioaparato ni iam ankaŭ aŭdis la por ni dissenditajn paroladojn de viaj reprezentantoj. Kiam ni aŭdis la por ni dissenditan paroladon de la reveninta reprezentanto oĉjo Ĉaj Ĉuanĵo, ni ĉiuj tre ĝojis kaj diris ke ni nepre konduitu laŭ liaj konsiloj.

En dimanĉo ni ofte vizitas diversajn ekspoziciojn, ekz. la Karbomino-Ekspozicio, la Petrolo-Ekspozicio, la Fervojo-Ekspozicio, la Sanitar-Ekspozicio kaj multaj ekspozicioj de la popoldemokrataj landoj Rumanio, Ĉeĥoslovakio ktp. La enhavoj estis vere riĉaj kaj el ĉiu ekspozicio ni lernis la plej vivan lecionon. Ni ankaŭ amikiĝas kun oĉjoj liberigaj armeanoj, labormodeloj, verkistoj kaj muzikistoj. Ili tre afable traktas nin. Oĉjoj liberigaj armeanoj ofte ludas kune kun ni partoprenante nian grupokunvenon, rakonti al ni batalajn historietojn, ludas akordionon kaj violonojn, kaj kulturas nian kuraĝan kaj optimisman spiriton. Oĉjo Juan Ŝe-kun, la labormodelo, rakontis al ni la historion kiel li kreis la karbonan pulvoron uzitan en la telefono kaj konsilis ke ni devas pene lerni kaj konkuri malfacilojn. La verkisto oĉjo Ĉang Tian-ĵi ja tre ŝatas nin. Ni vizitis lin, kiam li estis malsana, tamen li ankoraŭ al ni rakontis historietojn kaj siajn novajn verkojn, kaj petis niajn opiniojn. Ni vizitis ankaŭ la komponiston oĉjo Marko, kies verko "Ni estas la morgaŭaj membroj de la Junula Ligo" estas de ni la plej ŝatata kanto. Li klarigis al ni kiel respekti kaj varme ami la laborantajn popolanojn, kiel lerni de la populara muziko kaj kiel kulturi bonan kaj persistan laborsintenon. Ni antaŭe tamen opiniis ke komponado estas tre facila laboro. Oĉjoj volontuloj! Nia patrolando vere estas granda kaj feliĉa familio, jen kiel multaj homoj nin prizorgas, gardas, kulturas kaj edukas!

Lernante en tiel feliĉa cirkonstanco ni ĉiuj ofte pripensas kiel servi al la patrolando. Nia samklasano Ŝju Ŝan volas fariĝi arkitekto por konstrui la patrolandon pli bela. Tamen li samtempe ankaŭ ŝatas



Fervore Studu la Sciencojn por Konstrui Novan Ĉinion!
Pentris Ĉeng Ja-nan, 15-jara liceanino en Tienzin

muzikon kaj matematikon. Li volas fari siajn konstruaĵojn science kaj belarte. Nia samklasano Ĉou Li-ŝia aspiras fariĝi elektromekanikisto por akceli la elektrigon de la patrolando. Nia samklasano Li Jan-vej, kiu venis de la kamparo, aspiras fariĝi agronomo por fari la patrolandan teron pli fekunda. Kaj pri niaj samklasanoj, Vang Ŝiu-jan celas fariĝi kondukistino de lokomotivo kaj Jo Ĉaŭ-ŝjuan—la plej humana vartistino. Nia taĉmentestro Ĉang Ŝju intencas fariĝi kuracisto kaj Vang Ĵuejseng—aerarmeano... Estas ja malfacile raporti pri la tuto; unuvorte, ĉiu el ni havas sian propran aspiron. Oĉjoj, vi ne ridas je ni, ĉu? Ni scias ke tiuj aspiroj ne estas revoj. Se nur ni penos, ni nepre povos atingi la celojn.

Nia klaso nun estas la plej alta klaso en la tuta lernejo, kaj niaj malgrandaj samlernejanaj nomas nin pliaĝaj fraĉjoj kaj pliaĝaj franjoj. Ni ankaŭ ofte helpis ilin ekz. riparis por ili tablojn, seĝojn, librojn kaj purigis anstataŭ ili la fenestrajn vitrojn. Ni helpis niajn malgrandajn samlernejanajn de la duagrada klaso fondi sian bibliotekon. En la libertempo ni al ili rakontis historietojn kaj instruis ilin kanti kaj danci. Tiel intime amikaj estas la lernantoj de nia lernejo, kvazaŭ ni estus naskitaj de la sama panjo.

Komence de la 1-a de jan. de la kuranta jaro nia klaso ĉiutage enskribas en la Taglibron de Ruĝkravata Klaso. Ĉiutage 5 minutojn post la finiĝo de la lecionoj, ni diskutas kaj notas la gravajn aferojn. Ni ofte atentigas ĉiujn niajn klasanojn la kolektivajn gloron de nia Ruĝkravata Klaso. Ekz. kiam du pioniroj malpacigiĝis aŭ se iu pioniro ne akceptis la konsilon de instruisto aŭ ŝatis legi malbonajn bildlibretojn, tiam ni ilin kritikis en la Taglibro de Ruĝkravata Klaso. Kaj dank' al tio niaj eraroj rapide korektiĝis.



En Somera Tendejo

Pentris **Kiang Ŝou-ĉang**, 13-jara lernanto en Hankou

Karaj oĉjoj, kvankam en la pasinta unu jaro ni akiris tiujn progresojn, tamen ni neniam estas fieraj kaj memkontentaj. Ni devas ankoraŭ daŭre penadi. Ni ĉiuj pioniroj jam unuanime decidis nepre bonege lernadi kaj esti ĉiam pretaj por la batalado por konstrui nian grandan patrolandon kaj realigi la grandan ideon de Prezidanto Maŭ Ze-tung!

Akceptu la plej karan saluton de la Junaj Pioniroj.

La Ruĝkravata Klaso
Elementa Lernejo de Paŭkia-strato
la Dua Distrikto, Pekino
la 31an de majo, 1952

—Elĉinigiis Zekun

Ĉinio Malaltigas Prezojn...

(daŭrigo de P. 157)

kooperativaj vendejoj de porkonsumaj produktaĵoj montras plialtiĝojn de 20 procentoj ĝis tiel altaj kiel de 200 procentoj en ĉiutagaj vendoj. Vendejoj estas amasplenaĵoj kaj aĉetantoj forlasas ilin peze ŝarĝitaj per multaj pakajoj. La specialaj vendoj antaŭ la Majtago, ĉe kiuj ĉiuj prezoj estis provizore malaltigitaj je 5 procentoj, krom la ĝenerala reduktado, estis karakterizitaj per speciale granda alfluo de aĉetantoj.

La verkinto sekvis la aĉetrandiron de S-ino Juan Ĉih-ŝing, edzino de Pekina laboristo. Irante iun tagon en aprilo de montrotablo al montrotablo en filio de la Ĉina Magazeno en la urbo, ŝi aĉetis paron da ŝtrumpetoj por ĉiu el siaj infanoj en lernejo, ĉemizon por sia edzo, flordeseĝnitan ŝtofon por unu robo por si mem, kaj multe da aliaj domartikloj. Poste ŝi puŝis sin tra la amaso eksteren ridetante feliĉe.

S-ino Juan havis bonan kaŭzon por esti feliĉa. Sub la Kuomintang la monata salajro de ŝia edzo estis egala al 180 kilogramoj da milio laŭ valoro. En 1950, post liberigo, lia salajro estis egala al 245 kg. da milio, kaj nun ĝi povas aĉeti 360 kg, kio estas precize la duoblo de tio, kion li gajnis antaŭ 3 jaroj. Kontentiginte ĉiujn aliajn bezonojn, la familio nun povas rezervi 13 procentojn de lia salajro por aĉeti artiklojn de ĉiutaga uzo.

Kaŭze de la prezmalaltigoj tio povas aĉeti multe pli ol ĝi povis antaŭ unu jaro.

Nutraĵo Abunda

Parole pri nutraĵo, S-ino Juan ankaŭ profitis de la prezmalaltigoj dum la antaŭ-Majtagaj vendoj por akiri kelkajn bonajn aĵojn por la familia tablo. Portante la salajrokoverton de sia edzo, kiun li ricevis kelkajn tagojn pli frue ol ordinare por fari festtagan aĉetadon, ŝi iris al kooperativo kaj elvenis ŝarĝite per ovoj, bovajo, salikoketoj, unu fiŝo, iom da freŝaj legomoj kaj multe da fruktoj. Por doni al fremdlandaj legantoj ideon pri kurantaj nutraĵprezoj en Pekino, ni volas citi du: la plej bona bovajo (lumbajo) kosta la egalajn de 20 cendoj en Usona mono, aŭ ĉirkaŭ 1 ŝil. 5 p. en sterlingo po funto. La plej freŝaj ovoj vendiĝas po-detale por 15 cendoj Us. aŭ malpli ol 1 ŝil. 1 p. po dekduo.

En la Popola Respubliko de Ĉinio la familioj de laboristoj kiel tiu de Juan povas rigardi antaŭen kun plena fido al intersekvaj plialtiĝoj de salajroj kaj malaltigoj de prezoj, al senlima progreso de pliboniĝoj en la kondiĉoj kaj cirkonstancoj de sia vivo. La kontrasto kiun tio prezentas al kondiĉoj en kapitalistaj landoj signas la diferencon inter la nova demokratio kaj la kadukanta sistemo de privata profito je kosto de la popolo, kio alportas al la loĝantaro nenion ol mankon, ĉagrenon kaj militon.

Trad. K. Maier

Infana Tago en Ĉinio

La Internacia Infana Tago estis vaste celebrata je la 1-a de junio. En Pekino, pli ol 300,000 infanoj ĝuis sian propran tagon, kun parkoj, lokoj de historiaj vidindaĵoj kaj kinejoj senpage ilin akceptantaj. Multaj tramoj kaj aŭtobusoj estis rezervataj por infanoj kaj ilin veturigis senpage.

En Ŝanhajo, pli ol 100,000 infanoj aŭskultis brodkastitan paroladon de Urbestro Ĉen Ji, kiu ilin kuraĝigis bone trejni sin ambaŭ fizike kaj mense, en la novaj sciencaj vojoj nun malfermitaj al ili.

En Nankino 5,000 junaj pioniroj ĵuris je flaghisa ceremonio ke ili fariĝos bonaj infanoj de nova Ĉinio.

Infanoj en Hankoŭ renkontis la Dekanon de Canterbury, D-ro Howlett Johnson, kaj lian edzinon. Infanoj el la Sovetunio, Koreio, Hindio kaj Japanio loĝantaj en tiu urbo ankaŭ partoprenis la celebron.

Ĉe Lhasa, ĉefurbo de Tibeto, pli ol 600 infanoj de diversaj nacioj ĝoje kolektiĝis en la bela Jiŝuelinka Parko por celebri la Internacian Infanan Tagon.

Konstruado de Novaj Fervojoj

La lasta sekcio de la 505-kilometra Ĉengtu-Ĉunkinga Fervojo estis kompletigita je la 13a de junio, 17 tagojn antaŭ la laŭplane fiksita dato. Tiutage la unua vagonaro portanta konstruajn materialojn atingis la alian finon de la linio, Ĉengtu, kie dekmiloj da popolanoj bonvenigis ĝian alvenon. La konstruado de tiu ĉi fervojo estis komencita je la 15a de junio, 1950.

Nun atento enfokusigas sur alia projekto de fervojo—la Ĉengtu-Tienŝuj-a Fervojo, kiu interligos la

Rizo por Hindio

Kontrakto por eksporti 100,000 tunojn da rizo de Ĉinio al Hindio estis subskribita en Pekino de ĉina kaj hinda reprezentantoj je la 26a de majo.

La subskribintoj de la nova kontrakto estis Ministro de Komerco Je Ĉi-ĉuang, reprezentanta la Centran Popolan Registaron de Ĉinio, kaj hinda ambasadoro K. M. Panikkar por la hinda registaro.

Tiu ĉi estas la dua kontrakto tiuspeca inter Ĉinio kaj Hindio. Pasintjare kontrakto laŭ kiu Ĉinio devis eksporti 516,000 tunojn da rizo al Hindio jam plenumiĝis.

Sudokcidentan trafikajn retojn kun la Nordokcidenta. Konstruado de tiu ĉi linio estis komencita je la unua de junio. La unua sekcio 118 kilometrojn longa, de Ĉengtu ĝis Mienjang en Norda Seĉuan, espereble kompletigos kaj ekfunkcios en septembro, 1953. La tuta Ĉengtu-Tienŝuj-a linio kompletigos en 1955.

Printempa Arboplantado

Forstiga laboro por la printempo de 1952 jam kompletigis tra la tuta lando laŭplane, kun 158,280,000 arboj plantitaj sur 334,666 hektaroj da tero (en printempo de 1951 200,000 hektaroj estis priplantitaj). Jen ciferoj de la regionoj:

Nordorienta Ĉinio: 26,018 hektaroj da tero estas priplantitaj per arboj en la granda forstzono en la okcidenta parto de la regiono.

Norda Ĉinio: Grandskala forstigo en la forstzono de la Jungting-rivero.



Arboj plantiĝis laŭ 125 kilometrojn kaj 737 kilometrojn longaj bordoj de la rivero en Ĉarhar-provinco kaj Hopej-provinco respektive.

Centra-suda Ĉinio: Arboj estas plantitaj sur 120,000 hektaroj da tero plejparte laŭlonge de riveroj kaj en sabloareoj.

Terkulturaj Maŝinoj en Nordorienta Ĉinio

En la sekvantaj kelkaj jaroj ĉevaltirataj maŝinoj komplete anstataŭos la man-funkciigatajn terkulturajn instrumentojn en Nordorienta Ĉinio. Eksperimentoj pri tiuj maŝinoj en la pasintaj du jaroj montris 20-30-procentan pliiĝon de produkto po hektaro pro uzo de tiaj maŝinoj. La plano estas enkonduki 170,000 kompletojn da ĉeval-tirataj agrikulturaj maŝinoj inter 1953 kaj 1957.

La nombro de interhelpaj grupoj uzantaj maŝinojn kreskis trioble de 1950 ĝis 1951, kaj la postulo de agrikulturaj maŝinoj inter ili kreskas tagon post tago.

En la pasintaj du jaroj granda nombro da teknikistoj estis trejnita

en agrikulturaj kolegioj en diversaj provincoj. Ili servos kiel instruantoj kiam maŝinoj estos enkondukitaj grandskale. Aliaj 57,000 teknikistoj espereble eltrejniĝos inter 1953 kaj 1957.

Modela Fervojo

La enkonduko de progresintaj Sovetiaj labormetodoj jam faris la Ĉinan Ĉangĉun-fervojon modela entrepreno. Entute 130 novaj Sovetiaj metodoj estis adoptitaj kune kun ĉirkaŭ 2,000 raciigaj proponoj faritaj de la laboristoj.

Efikeco de la tuta fervoj-sistemo konsiderinde pliboniĝis rezulte de apliko de tiuj ĉi metodoj. La celita frajto de 1950 estis superplenumita je 4.1%. En 1951 la frajto superis tiun de la antaŭa jaro je 50,000 vagonŝarĝoj.

La kilometro-nombro de la mez-nombra ĉiutaga kurado de lokomotivo pliiĝis je 8% en la unua kvarono de tiu ĉi jaro kompare kun tiu de lasta novembro. La kampanjo por plia frajto rezultigis en la transportado 4.54 milion tunojn da ŝarĝo super la plano de 1951. Tio ĉi kreis ekstran valoron de 1,180 milion juanoj por la lando.

Komerca kalkulo estas jam enkondukita en 63 sekcioj de tiu ĉi fervojo. Po-pec-kalkula salajro-sistemo jam estas adoptita.

Feliĉiga laboro por la laboristoj sur tiu ĉi fervojo ankaŭ pliboniĝis. Sekurigaj ekipaĵoj estas instalitaj en ĉiuj produktaj unuoj. Ne malpli ol 17,200 kvadrataj metroj da loĝejoj estis riparitaj en 1951. Pli ol 16,000 kadroj kaj teknikistoj vizitis teknikajn lernejojn kaj specialajn altgradajn kursojn.

Privataj Fabrikoj en Ŝanhajo

Laŭ la registara politiko prosperigi privatajn entreprenojn utilajn al la nacia ekonomio, la Popola Registaro jam faris mendojn al sennombraj entreprenoj en Ŝanhajo.

En la unua duono de aprilo pli ol 3,000 privataj kompanioj en 34 diversaj produkto-kampoj ricevis mendojn de ŝtalo, fero, brazo, kupro, kaŭĉuko, maŝinoj, kaj elektraj instalaĵoj.

La Orientĉinia Industria Departemento faris mendojn de diversaj produktaĵoj al 80% de la lokaj metalaj fabrikoj. Du cent fabrikoj de teksaj maŝinoj ankaŭ estas okupataj por plenumi registarajn mendojn.

Krome, la Popola Registaro aĉetis grandajn kvantojn da finitaj produktaĵoj de lokaj privataj teksejoj kaj tinkturadaj fabrikoj. En marto tiaj mendoj atingis 55.02% de la tuta produkto de ĉi tiuj entreprenoj.

Kontraŭ la Glacia Torento de Som-rivero

Ĉing Ni

I

Jam estis post noktomezo. Ĉe la transa flanko de la monto pafklakado daŭriĝis furioze.

La ĉielo estis plene kovrita de nigra nubaro. Kvankam ne pluvis ankoraŭ, tamen maldensaj pluveroj frapis malvarme sur la vizaĝon de tempo al tempo, anoncante la venontan pluvon.

Hu Pin ĵus revenis de surstangado de telefona fadeno. Li apenaŭ enpaŝis la pordegon, kiam pluvogutoj ekbatetis sur amason de maizotigoj kaj komencis susuri brue. Venis al li la ideo: "Mi manĝu ion unue, antaŭ ol la pluvo furioziĝos!" Sekve li turnis sin al la korto, kie la kuirejo troviĝis. Tie li renkontis Malgrandan Liu, kiu sciigis al li, ke la direktoro serĉas lin por komisi al li novan taskon.

La ĝojo, kiu naskiĝis de la ĵus plenumita tasko kaj la honoro tuj ricevi novan entuziasmigis lin tiom, ke li tute forgesis pri la manĝo, kvankam li absolute nenion enbuŝigis de post la matenmanĝo.

La rota komandejo situis en korteto tuj apud pinaro. La pordo kaj la fenestroj estis hermetike kovritaj per manteloj kaj lit-kovriloj, tra kiuj ne filtriĝis radioj de la lamplumo. La direktoro kliniĝis ĉe malforta kandellumo kaj skribis ion. Rimarkinte, ke la envenanto estas Hu Pin, li ĝoje surpriziĝis kaj demandis je la ekvido:

"Ho! Ĉu vi? Kiam vi revenis?"

"Ĵus alvenis."

"Bone! La taskon mi do komisiis al vi! La fadeno al la Dua Bataliono malfunkcias!"

"Ĉu?"

"Laŭ la aserto de ĵus alsendita kaptito, la aranĝo de la malamiko havas novan ŝanĝon, tamen ĝian intencon ni ankoraŭ ne povas bone juĝi. La armea komandejo postulas, ke ĉiuj unuoj liveru informojn ĝustatempe... La pozicio de la Dua Bataliono estas la plej antaŭa parto de nia regimento kaj tute proksima al la ŝoseo. Tiu fadeno nepre devas konservi sian bonan funkcion. Sur vin mi metas la tutan respondecon. Tuj riparu, kiam ajn vi trovos ĝin difektita."

"Bone! Mi iras jam nun." Hu Pin levis la kurtenon, brue puŝmalfermis la pordon kaj eliris.

La direktoro fiksas sian rigardon mute al la ankoraŭ svingiĝanta kurteno kaj priaŭskultis momente la pafadon kaj la pluvan frapadon ekstere kaj pensis pretervole: "Kia granda kaj aminda batalanto!... Kvazaŭ li neniam sciis kio estas laceco kaj ĉiam laboras tiel fervore kaj gaje... Jam tutan tagon li ne ripozis!—Ha! Eble li eĉ ne manĝis?!"

Tion konsiderante li ordonis Malgrandan Liu, ke li revenigu Hu Pin. Tiu obeis kaj starante en la pluvo, kunmetante ambaŭ manojn trumpetforme antaŭ la buŝon, kriis trenparole tiel laŭte kiel eble per sia akuta voĉo: "Hu—Pin,— Hu—Pin..."

"He—" aŭdiĝis sonora respondo el la fino de la vilaĝo.

"Revenu rapide! Revenu rapide! La direktoro havas ion alian diri al vi!"

Hu Pin baldaŭ revenis kurante.

"Raporton—kion krome?"

"Vi ne manĝis ankoraŭ?"

"Mi jam manĝis!"

"Kie vi manĝis? Ĉu vi ne diris, ke vi ĵus alvenis?"

"Mi, mi ne malsatas—"

La direktoro ĵetis rigardon al la streĉita zono ĉirkaŭ lia talio: "Kie estas viaj biskvitoj? Ĉu vi ne kunportis?"

"Ne. Ĝi postrestas en la subpelotono."

"Nu!" La direktoro ekkaptis sian saketon da biskvitoj tute ne tuŝitan: "Ĝi estas por vi! Prenu!"

"Ne!" Hu Pin levis ambaŭ manplatojn kaj forpuŝis kun obstineco: "Ĉu vi ne diris, ke neniuj estas permesita tuŝi ĝin sen ordono?"

"Sed ĉu vi komprenas kial mi tiel diris?"

"Ĉar ĝi estas por la momento, kiam oni devas plenumi la taskon kaj ne havas tempon por manĝado. Se oni formanĝus ĝin laŭplaĉe en ordinaraĵoj..."

"Prave!" La direktoro ne povis reteni sin de rideto: "Tial nun estas la tempo manĝi ĝin en via kazo."

Hu Pin havis nenion diri. Neniu sciis kiam, Malgranda Liu kuris en la kuirejon kaj alportis plenan kruĉon da boligita akvo, nun li intermetis:

"He! Huĉjo! Jen estas iom da boligita akvo, kiun oni speciale preparis por la direktoro. Nun vi kunportu!"

"Ne, ĝi fariĝos ŝarĝo por mi ĉe la talio. Ĉu oni ne povus akiri iom da akvo sur la vojo!"

"Atentu, ke ne malsaniĝu pro la trinkado de neboligita akvo!"

"Ho, vi ja rigardas min kiel vin mem, kiu ĝemus tri tagojn, se estus frapita de muŝ-flugilo."

"Ho! mian bonan intencon porti al vi boligitan akvon, vi rekomencas per tia parolo?"

"Estas preferinde ĝin kunporti," diris la direktoro kun zorgemo, ĵetis rigardon al la angulo de la terlito kaj demandis Malgrandan Liu:

"Kie estas mia pluvomantelo?"

"Ĝi estas uzata por kovri la fenestron."

"Ĝin anstataŭigu per io alia..."

Hu Pin ligis la saketon de provizaĵo al la zono kaj Malgranda Liu metis sur lin la pluvomantelon kun komplezemo. Tiu salutis la direktoron, puŝmalfermis la pordon malpeze kaj eliris.

II

La nokto estis fulge nigra.

Densa pafado tondris sur la monto. Glaciaj pluvogutoj falis sur lian tutan korpon. Sur zigzaga vojeto, laŭlonge de la telefona fadeno Hu Pin antaŭeniris palpante kun ĉiam pli rapidaj paŝoj. Kiam la vojo estis malebena, li rampis antaŭen malrapide kun retenita spirado, ĉiam alteniĝante al la arbobranĉoj; kiam ĝi fariĝis pli ebena, do li elprenis kelke da biskvitoj, enbuŝigis kaj maĉadis krakante.

Ĉiupaŝe li esploris tre atente ĝis Som-rivero, kiam la pluvo malfortiĝis iom post iom kaj la nigra nubaro ĉiam pli paliĝis.

Estis en la komenco de aprilo. La glacikovrita Som-rivero ekdegelis. Printempa torento kunportante grandajn kaj malgrandajn glacipecojn kuris kaj muĝis tumulte en la mezo de la rivero.

“Ha! La kaŭzo kuŝas ĉi tie sendube!” Dirinte tion al si, li ekstreĉis la ŝulaĉojn, malbutonis la pluvomantelon, demetis sian vatitan pantalonon, disetendinte la kruringojn de la pantolono ĝin ĵetis trans la ŝultrojn, kaj denove surmetinte la pluvomantelon li ekvadis plaŭde en la akvon laŭ la telefona fadeno. Subita frostro trakuris liajn krurojn.

Sub la akvopelo la fadeno fleksiĝis arkoforme en la direkto de la fluo, kaj proksime al la rivermezo iris rekte laŭ la fluo eĉ sen fleksiĝo.

“Ha! Ĉu ne? La kaŭzo kuŝas ĉi tie! Mi elserĉu la alian fragmenton de la rompita fadeno kaj ilin kunligu!” Kun la fadeno en la mano li vadis antaŭen, sed tuj post kiam li atingis la rivermezon, li jam ĝisiris la finon de la fadeno kaj ne sciis kien la alia fragmento estas forlavitita. Li trovis sin en dilema situacio.

“Oni neniel povos enmanigi ambaŭ fragmentojn samtempe, do kiel ilin kontaktigu?... Ho, ĉu mi reiru kaj alportu fadenon? Neeble. Tempo ne permesas. Oni devas plenumi la taskon en plej mallonga tempo. Hu Pin restis stulte en la akvo. La glacipecoj susuris inter liaj femuroj.

Li ekmemoris, ke la malamikoj postlasis ĉie kaŭĉuke envolvitan fadenon sur la vojo dum ilia forkurado. Ĝi jen en tuta volvaĵo kuŝis apud la vojo, jen treniĝis implikite tra la kampo.

“Jes, ĉi tie ĝi nepre troviĝas. Mi iros elserĉi.” Li delasis la rompitan fadenon en la akvon kaj vadis ĝis la kontraŭa bordo sen malantaŭenrigardo.

Li iom forfrotis la akvon de la kruroj kaj surmetis rapide sian pantalonon. Li konjektis laŭ sia sperto, kie la malamikoj iris verŝajne dum la fadeno-surstangado. Li kurbigis sin kaj iris tien kaj reen laŭ la montpiedo, fosaĵoj kaj kamplimoj palpante kaj serĉante kiel kontraŭmina sapeisto en nigra nokto. Ĉiufoje, kiam li tuŝis maldikan lianon, lin ekcitis ekĝojo, sed sekvis elreviĝo senescepte.

La pluvo jam ĉesis. La malamikaj aeroplanoj denove rondiris zumante super la rivero. Tri-kvar flagrobomboj en unu linio disradiis ruĝan lumon en la nokta firmamento kaj faris la riverbordon helega. Hu Pin ĵetis koleran rigardon al la ĉielo kaj blasfemis: “Al la diablo! Ĝa tre utilas al mi tia lamplumo. Vidu, ĉu vi povas malhelpi min kunligi la fadenon?”

Profitante la ‘lamplumon’ li rampis tre rapide laŭlonge de la nigra silueto de arbustaro kaj priserĉis. Subite io frapiĝis tintante kontraŭ lia dekstra kubuto. Je la ekrigardo li kredis, ke tio estas akcesoraĵo de dispaŝita aŭtomobilo, sed kiam li rigardis pli atente, li trovis ĝin malplena Usono-farita fadenvolvilo. Li ne povis reteni sian ĝojon. Jen la indikilo, kiu montris, ke ie proksime troviĝas kaŭĉuke envolvita fadeno forlasita de la malamikoj.

Efektive fadeno kuŝis ĉe la piedo de bomb-faligita pinarbo ĉirkaŭ dek metrojn for de li kaj estis baldaŭ malkovrita. Li tiris prove. Unu fino streĉiĝis malcedeme, sed la alia fino cedis obeeme al lia tiro. Sekve

li kaŭriĝis en la ombro de la pinarbo, ekprenis la fadenon kaj komencis kunvolvi rapide.

La malamika aeroplano rondflugis iom da tempo. Ne trovante bombindan celon, ĝi blinde maŝinpafis kelkfoje sur la riversupraĵon kaj forflugis malvigle kun zumado. Restis nur forbruliĝanta flagro-bombo, kiu ŝvebis solece kun palflava helo sur la firmamento. Profitante la lumon Hu Pin plirapidigis la volvadon. Kiam li taksis ke ĝi estas sufiĉa, li elprenis de sia talio pinĉilon kaj tondis la fadenon ĉe ambaŭ finoj, ekleviĝis kaj kuris al la riverbordo. La kotkaĉo en la rizkampo ŝprucis plaŭde sur lian korpon.

En la ‘lamplumo’ li rapide kaj lerte konektis ĉi tiun finon de la fadeno, poste li demetis la vatitan pantalonon kaj kun la fadeno en la mano li tuj vadis al la transa bordo. Dum la pasinta mallonga tempo la akvo multe leviĝis. Glacipecoj frapiĝis krakante kontraŭ lia abdomeno kaj plurfoje renversis lin preskaŭ.

Tre feliĉe estis, ke ĝuste kiam li finaranĝis la fadenon, formortis la flagra bombo. Li tuj almetis telefonan aparaton kaj sonorigis. Tinlinlinlin... Arĝenta sonoro respondis. Kiel agrable tion aŭdi!

Per telefono li raportis la okazintaĵon al la direktoro, kiu laŭdis lin unue kaj poste diris al li: “Se tiel statas la afero, verŝajne ĝi denove rompiĝos sub la akvopelo... Do ne revenu ĉi tien ĉar la vojo estas longa, sed turnu vin al la komandejo de la Dua Bataliono, tiel ke vi povu akiri fajron por vin varmigi...” Tial li demetis la vatitan pantalonon kaj travadis la glacian riveron ankoraŭfoje.

La vojo, kiun li nun iris, kvankam sur-monta, estis tre ebena. Li povis iri tute trankvile kaj ne necesis teni sin per la mano je la branĉoj.

Survoje denove pluvis miksite de neĝflokaj.

Sed la paŝado malpli densiĝis ol antaŭe.

Kiam li eniris la ŝirmejon de la Dua-Bataliona komandejo, la direktoro vidante lian froste paliĝintan vizaĝon kaj purpurigintajn lipojn, kriis pretervole je surprizo: “Ho ve! Ĉu estas vi, kiu esploris la telefonan fadenon? Vidu! kiel vi frostiĝis! Tuj varmigu vin ĉe la fajro!...”

La kamaradoj alproksimiĝis sen interkonsento, malbutonis por li la pluvo-mantelon kun komplezemo kaj babilis simpatie:

“Kie rompis la fadeno? Ho, rigardu vin mem...”

“Tuj demetu viajn ŝuojn! Mi havas paron da novaj en la pakajo!”

“Unue trinku iom da varma akvo!”

“Ne, unue kovru vin per lankovrilo kaj iom dormu!”

“.....”

Li estis tiel ĝoja, ke li ne sciis kiel respondi, do li simple diris ridante al la amaso:

“Mi fartas neniel malbone. Estis tiel varme, ke mi ĵetiĝis en Som-riveron por min refreŝigi, haha...”

Ĝuste en tiu gaja momento la knabeto, kiu telefonis ĉe la tableto kun la aŭdilo en la mano— tiu estis la telefon-dejoristo, Malgranda Jang Kvina—ekkriis maltrankvile kun falseta voĉo: “Ha, malbenite! malbenite! ĝi denove malfunkciigas! Direktoro! Direktoro!”

“He! Kio?” Hu Pin konvulsiis je surprizo kaj demandis unuvoĉe kun la batalionestro kaj la direktoro. “Ĝi denove malfunkcias?”

(daŭrigo sur p. 150)

PORPACA PAROLADKUNSIDO EN NAGOJA

Karaj kamaradoj,

La 17an de majo, okazis la granda porpaca paroladokunsido en Nagoja aranĝita de la Pacdefenda Komitato de Nagoja, kaj por ĝi oni invitis k-don Oojama, ricevinto de la granda Stalina pacpremio.

Post la senekzempla kruela buĉado en la lasta Maja Tago en Tokio, certe leviĝis indigne la japana popolo. Precipe la studentoj kaj laboristoj, ĉar 7 studentoj estis mortigitaj en Tokio kaj laboristoj nun preparas la trian ĝeneralan strikon kontraŭ la "antirompaga leĝo" kaj malboniga amendo de la laborleĝo.

Tamen la subpremado de reakciula registaro estis severa, ke ni estis tre maltrankvilaj pri la rezulto de ĉi kunveno. Kaj plie nun preskaŭ ĉiuj agemuloj en grandaj sindikatoj estas jam elpelitaj el iliaj laborejoj de la manoj de la marioneta registaro. Tial ni havis nenian rimedon vendi la enirbiletojn publike.

Tamen, tute mirige, neatendite—ne! ne! sed tio estis ja plej justa!—kolektigis pli ol 30,000 laboristoj kaj studentoj!! Popolamasoj estis ja ĉiam pacamantaj! Nia maltrankvilo estis tute erara kaj estingiĝis eterne.

La kunsido malfermiĝis ekde la 5a horo p.m., sed oni trovis ĉe la kunvenejo ĉirkaŭ 10,000 laboristojn eĉ 1 horon antaŭe. Post ĥoro de Packanto, kaj nacia danco de koreaj lernantoj, ekkomenciĝis parolado.

Prof. T. Tozaŭa (dekano de jura fakultato en Universitato Nagoja) paroladis pri nuna politika situacio de Japanio....tuj kiam li finis sian paroladon per la vortoj "ni estas nun perfekte sklavoj, do ni batalu por liberigi nin de nuna kolonia stato," leviĝis la aplaŭdo kiu daŭris ĉirkaŭ 10 minutojn. Kaj inspiritaj ĉeestantoj ekkantis la kanton "Defendu la Pacon!"

Post paroladoj de k-do J. Hirano (ĉefo de esplor-instituto pri Ĉinio) kaj k-dino S. Hukao (fama poetino), fine aperis k-do Oojama sur la estrado, kaj kiam du knabinoj donacis al li bukedon belan aplaŭdis nekompareble laŭte ĉiuj ĉeestantoj. Kaj li preskaŭ ne povis paroli, ĉar ĉiuj aŭskultantoj klakfrapis siajn manojn ĉiufoje, kiam li diris iujn vortojn. Precipe kiam li parolis "Sen Paco en Azio, oni perfekte ne povus akiri la Pacon de la tuta mondo. Ni devas esti porĉiamaj amikoj de nova Ĉinio najbara," pli ol 10 minutojn daŭris la manklakado.

Ĉirkaŭ unu horon daŭris lia parolado sub la temo de "Internacia Politika Situacio kaj Stalin-a Pacpremio". Apenaŭ finiĝis lia parolado, tuj stariĝantaj aŭskultantoj ekkriis, "Vivu k-do Oojama! Gloru la granda Stalin-a pacpremio internacia!" kaj ekkantis la kanton "La Internacio".

Post ĉi tiuj paroladoj, estis prezentata la filmo pri la kruela buĉado en Tokio, kiu estis produktita de la sinoferintaj filmspecialistoj progresemaj kaj estis publikigata ĉiokaze por la unua fojo en nia lando. Kvankam tiu filmo estis silenta pro tio, ke al la produktistoj mankis tempo kaj mono por tio, tamen tute



spontane eksonoradis el rigardantoj la ĥoro de "Packanto", "Kanto de Maja Tago" kaj "La Internacio" kaj daŭris ĝis la fino. Kaj la plej impresplena estis la sceno, ke laboristoj partoprenintaj en la Maja Tago bruligis la plej modernajn aŭtojn de usonanoj antaŭ la konstruado de la stabo de Usona Okupanta Armeo. Ankaŭ leviĝis la ventegoj de aplaŭdoj, kiam estis prezentata la sceno, ke laboristoj kaj studentoj rezistadis defendante sin per siaj flagstangoj kaj ŝtonetoj kontraŭ la senhonta atako de la armitaj policanoj.

Tiel fermiĝis la kunveno. Ĉiuj ĉeestintoj jam komprenis kiel potenca estas la forto de Paco, kaj eble ili rakontos al aliaj neĉeestintoj pri tio. Tiel pli kaj pli disvastiĝos la pacforto eĉ se ĉiuj komercaj ĵurnaloj intencus neglekti tion.

Via T. A.
Nagoja, Japanio

NI VOLAS NIAN KAMPON

Karaj kamaradoj,

Kia hontego ke tiuj infektaj bombadoj de la usonanoj sur la heroa popolo korea! Mi esperas ke tiuj krimuloj estos severe punotaj, seve- rege eĉ.

La usonanoj invadas ĉiam pli kaj pli mian landon, sed nun veraj

francoj, la honestaj personoj komprenis kion volas fari usonanoj.

Ofte niaj okupantoj elradikigas arbojn kaj eĉ vinberejojn por konstrui aviadilejojn, sed niaj kamparanoj ne ŝatas multe tion. La pasintan semajnon, en vilaĝo la usonanoj avertis la loĝantojn ke ili devas fari aviadkampon kaj tuje ili markis la limojn de tiu kampo per bastonetoj, sed la kamparanoj kunvenis kaj tuje iris manifestante elradikigi la bastonetojn dirante, "La tero apartenas al ni, ni volas nian kampon."

Pli kaj pli multe aperas ĉie "Go Home", oni legas tiel ion ke la usonanoj estas bonege senkuragiĝitaj; ili ne komprenas kial la francoj ne volas "esti defendataj". Sed ni scias ke ni ne bezonas esti "defendataj."

Vivu PACO! Punego al krimuloj!
Vivu Maŭ Ze-tung!

Fratan Saluton!

Via franca kamarado Farail

BALDAŬ LA DENTOJ DE LA IMPERIISTAJ BESTOJ ESTOS ELŜIRATAJ

Karaj kamaradoj,

Tre min interesas ĉio kio okazas en via lando kaj ĉio kio koncernas vian bravegan popolon, kiu ĉiutage donas fortegajn batojn al la imperiistaj militincitistoj, kiuj uzas la plej barbarajn ilojn, provante denove subjugi tiujn homojn kiuj gustumis la liberecon. Sed sendube baldaŭ al la imperiista besto estos elŝirataj la dentoj. Pri tio garantias la paca volo de cent milionoj da homoj tra la tuta mondo. Ne pensu, ke tiu manpleno da holandaj volontuloj kiuj nun batalas en Koreio kontraŭ la bravaj korea kaj ĉina popoloj, reprezentas la Nederlandan popolon. Ili konsistas el faŝistoj, aventuristoj, sentaŭguloj kaj senesperuloj. Multaj el ili estis kaj estas kondamnitaj ĉi tie pro ia krimo ekz. murdo, ŝtelado, atenco. Ekz. antaŭ du tagoj unu "volontulo" en Amsterdamo vivdangere pafe vundis sian eksan bopatron 64-jaran, kiu ne plu volis ke lia filino rilatu kun li. Krome tiu bandito vundis ankoraŭ alian virinon, kiam li pafe plenigis sian revolveron. Tiaj uloj en Koreio "defendas" la "civilizon"—diris "nia" registaro. Nu, karaj kamaradoj, mi finas, sendante al vi miajn plej bonajn dezirojn kaj multe da sukceso en la batalo kontraŭ la banditaro, kiu ankaŭ subpremas nian laborantan popolon.

via
Ru Bossong, Nederlando

Kunlaboru Tutmondaj Esperantistoj!

Traduko, represo, resumo kaj ĉiumanieraj utiligoj de materialoj en nia bulteno estas permesataj kaj dezirataj kondiĉe ke ili ne estos malice kripligataj kaj la utiliginto plenumos niajn jenajn petojn:

1) Post la traduko, represo, resumo aŭ aliaj utiligoj rimarki aparte el kiu numero de nia bulteno ĝi estas tradukita ktp.

2) *Sendi al ni 4 ekzemplerojn* de la traduko, represo aŭ resumo kaj sur ili noti el kiu numero kaj kiu artikolo ĝi estas tradukita ktp.

3) Sciigi al ni kia estas la *jurnalo aŭ gazeto*, sur kiu aperis la traduko, represo, aŭ resumo kaj, se eble, kiom da legantoj ĝi posedas.

"Plej bona propagando estas praktiko". Estas jam tempo por antaŭenpuŝi nian movadon al pli alta stadio ol nur propagandi. Kunlaboru, ĉiuj esperantistoj tra la tuta mondo!

La Red.

PAGU AL NIAJ PERANTOJ

- Aŭstralio:** (1) **Steve Bennett**, Flat 3, 62 Brighton Av., Croydon Park, N. S. W. (Jarabono 7s. 6p.)
(2) (por abono:) **A. Keesing**, G. P. O. Box 4836, Sydney.
(3) (por aĉeto:) **Current Book Distributors**, 40 Market Street, Sydney, NSW.

Aŭstrio: **Antonio Balague**, St.-Pölten, Kirchenweg 12. (Jarabono 20 schilling-oj)

Belgio: **Walraevens Rajmundo**, Rabelais Strato, 10, Bruselo. (Poŝtekkonto: 16, 43, 53) (Jarabono: 50 bfr.)

Britlando: **F-ino F. Paraige**, 10 Woronzow Road, St. John's Wood, London, N. W. 8. (Jarabono 6 ang. ŝil.)

Bulgario: (1) **Bulgara Esperantista Kooperativo**, Sofia—Str. TRI UŜI, 15. (Jarabono 8 Lv.)
(2) **Ivan Kovaĉev**, Sofia, str. "Iv. Bigor" no. 24.

Ĉeĥoslovakio: **Burda Rudolf**, Plzen, palackeho N. ĉ. 6, (Jarabono 50 kĉs.)

Danlando: **Borge Astrup**, Ymersvej 32, Randers. (Jarabono 6 kronoj)

Finnlando: **Niilo Kavenius**, Niklaksenkatu 10/14, Turku 9. (Jarabono: 300 Fmk.)

Francio: **Labor-Esperantista Federacio** (Jarabono: Fr. F. 450)

Germanio: (1) **Helmut Löffler**, Mittweida/Sachsen, Theaterstrasse 1. (Jarabono: 6 D.M.)
(2) **Heiny Knorr**, (24) Hamburg-Wellingsbüttel, Ekerkamp 81.

Hungario: (1) **KULTURA**, Budapest, V. Akademia u. 10. (Jarabono 15 forintoj)
(2) **Marton Lajos**, Bors.-u. 2, Budapest, XII, (poŝtkonto 38.187)

Islando: **Siguldur Gudmundsson**, Falkagata 1, Reykjavik. (Jarabono 15 kronoj)

Italio: **Eduardo Zumbo**, Casella postale 226, Torino. (Jarabono: 400 liroj)

Izraelio: **Bencion H. Danon**, Kibuc Afikim. (Jarabono: 400 prutoj)

Japanio: (jarabono 360 jen-oj)

Nederlando: (1) **Heroldo de Esperanto**, Harstenhoekweg 223, Scheveningen. (Jarabono fl. 3.50)
(2) **Esperanto-Grupo Vaals**, Pr. Bernhard-str. 4, Vaals.

Pollando: **Asocio de Esperantistoj en Pollando**, Warszawa Marszałkowska 81/32. (Poŝteka konto I—4329/113) (Jarabono 12 zł.)

Rumanio: **Rumana Esperantista Societo**, București I, Bulev. 6 Martie 15, et. I. (Jarabono: 120 leoj)

Svedio: **Einar Adamson**, Värmlandsgatan 18, Göteborg. (Jarabono 5 kronoj)

Usono: (jarabono \$1.25)

Rim: Legantoj en aliaj landoj povas pagi per respond-kuponoj (1 rk. kontraŭ 1 ekz.) aŭ egalvaloraj Esp-aj libroj (sed ne gazetoj). Senpagan specimenon ni sendos al ĉiu kiu letere postulos.

EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno eldonata de Fremdlingva Eldonejo

26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

ENHAVO

Bildo sur la kovrilo—Prezidanto Maŭ, felicitiganto de ni
ujvuraj geknaboj

La Elektitaj Verkoj de Maŭ Zetung

Krimo kaj Heroeco sur Koje-Insulo

Deklaracio de la Prepara Konferenco por la Paĉkonferenco de Azia kaj Pacifika Regionoj Ĉina-japana Komerca Kontrakto —Paŝo al Paco

Batalo kontraŭ Inundminaco En Heroa Koreio

Ĉinio Malaltigas Prezojn Ankoraŭfoje

Miaj Impresoj pri Nova Ĉinio Al Oĉjoj Volontuloj

Kontraŭ la Glacia Torento de Som-Rivero